

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՆԻՅԱԿ
ՅԵՐՍԵՆԻՔՄՃԸՄԱ



IZLOŽBA
DVADESET BROJEVA
ČASOPISA
"ZAGREBA ESPERANTISTO"

Ĉi-numere legu pri:

**ZAMENHOFA TAGO FESTITA
OKDEKOPE EN BJELOVAR**

**INTERVJUO KUN OSMO BULLER,
LA ĜENERALA DIREKTORO DE ŬEA**

**RECENZO PRI "SONĜOJ KAJ
OMBROJ" DE ZDRAVKO SELEŠ**

**EPISKOPO STROSSMAYER
KAJ BULGAROJ**

Ekspozicio pri dudek numeroj de nia revuo

1

2013

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

**Ĉefa kaj respondeca
redaktoro:**

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

dumonata

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

RESUMO

ABONKAMPANJO 2013

En decembro pasintjare, nia gazeto per aperigo de la 20-a numero, signis malgrandan jubileon. Malantaŭ ni restis 632 paĝoj da diversaj tekstoj, el kio proksimume kvarono plenkolora presita. Diverstemaj artikoloj akiris simpatiojn de multaj legantoj el la tuta mondo, kaj malfermiteco de niaj paĝoj al verkantoj kaj legantoj, estas unu el niaj plej gravaj kvalitoj. Pro tio ni povas, sen falsa modesteco, konsenti kun la asertoj de niaj legantoj, ke "Zagreba Esperantisto" estas la plej bonkvalita Esperanto-gazeto aperinta ĝis nun en Kroatio.

Ĉu ni volas plue montri nin en la sama vesto? Ĉu ni volas, ke nia "Zagreba Esperantisto" ankaŭ estonte estu same kvalita, aŭ eĉ pli kvalita ol ĝi estis ĝis nun?

Ni invitas vin, ke per viaj abononj en 2013 vi faciligu niajn eldonajn klopodojn je komuna utilo de la Esperantomovado en Kroatio kaj eksterlande.

Por 6-numera abono en 2013, ĉiu abonanto devus pagi nur **120 kunaĵojn (respektive 18 eŭrojn)**. Por ĉiu el ni tiu sumo estas relative malgranda, sed kolekti la bezonatajn 4.000-5.000 eŭrojn por kovri la kostojn de presado kaj ekspedo, por la eldonanto estas granda tasko, aparte en la nuntempaj malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj. Aperado de la gazeto okazadus senprobleme kaj regule, se nur 300 homoj abonus ĝin!

Ĝis nun ni volonte kaj ofte donacadis al vi nian gazeton senpage, sed kun via financa subteno nia misio estus multe pli simpla, multe pli facile realigebla.

Ni esperas, ke vi rekonos la valorajojn de "Zagreba Esperantisto", kaj ankaŭ en la jaro 2013 estos unu el niaj kontentaj legantoj kaj abonantoj.

Ĉar la gazeto estas redaktata, presata kaj ekspedata en Đurđevac, cele al plibonigo de kontrolado de abonpagoj kaj ekspedo, ekde 2013 UZE decidis kontrakti kun Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Đurđevac, ke la abonkotizoj estu pagataj favore al konto de DEC: **2360000-1102158381** (por enlandaj pagoj) kaj **HR5023600001102158381 SWIFT: ZABAHR2X** (por eksterlandaj pagoj). La abononj daŭre pageblas ankaŭ al konto de UZE ĉe UEA: **uzes-y**.

Dankon pro via kunlaboro, kaj bonan legadon!

ZAMENHOFTAGA FESTO EN BJELOVAR

Redakcia kompilo

La 15-an de decembro 1859 en Bjalistoko naskiĝis **Ludoviko Lazaro Zamenhof**, la aŭtoro de Esperanto. Lia verko en 2012 fariĝis 125-jara. Jam en 1920-aj jaroj, nelonge post la forpaso de la aŭtoro de Esperanto, grupo de Esperantaj intelektuloj kaj konataj movadaj aktivuloj, inter kiuj troviĝis ekz. **Julio Baghy** kaj **Nikolao Nekrasov**, proponis ke esperantistoj establu festotagon de Esperanta kulturo. Kio pli logika ol proklami la naskiĝdaton de **Zamenhof** tia tago?

Hodiaŭ cirkulas diversaj opinioj pri la Zamenhofa tago. Iuj opinias ke ne konsilindas menci tiu nomon de **Zamenhof**, ĉar tio prezentas "kul-ton de personeco", aliaj, male opinias, ke ĝuste lin oni devus glorigi, ĉar sen li ekzistus nek la lingvo, nek la movado, nek la specifa supernacia kulturo de

esperantistoj. Kiaj ajn opinioj regas, Zamenhofa tago fariĝis neevitebla festotago de esperantistoj, kiun oni de jaro al jaro celebras diversmaniere.

En la jubilea jaro 2012, kiam Esperanto festas sian 125-an datrevenon, kroataj esperantistoj jubileis diversloke, sed la ĉefa festo okazis en Bjelovar.

Precize la 15-an de decembro, invititaj de **Bjelovara Esperantista Societo** kaj la kunorganizantoj **Dokumenta Esperanto-Centro** el **Đurđevac** kaj **Esperanto-societo "Estonteco"** el **Križevci**, en **Bjelovar** kunvenis okdeko da kroataj esperantistoj, ĉefe el la regiono, sed ankaŭ el pluraj aliaj urboj. Granda grupo venis el **Zagrebo** trajnkaravane, kiun organizis por siaj membroj **Kroata Fervojista Esperanta Asocio** (KFEA).

Pri diversaj programeroj kiujn la organizantoj preparis por siaj gastoj, bonvolu pli detale legi sur sekvaj paĝoj. Ni nur skizis ilin. Gvidita de la prezidantino **Marica Brletić**, la KFEA-karavano venis al **Bjelovar** akurate je la 9h08. En la stacidomo atendis ilin la reprezentantino de la organizantoj **Grozdana Grubišić-Popović**, kiu gvidis la grupon al la Popola biblioteko **"Petar Preradović"**. La gastoj tie partoprenis la unuan parton de la programo, respektive la tri ekspoziciojn: la fotoekspozicion **"La vivo tra objektivo"** (de **Ivica Šćepanović**), la bildkartekspozicion **"La mondo estas mirinda ĝardeno"** kaj la ekspozicion **"Dudek numeroj de la revuo Zagreba Esperantisto"**. Tiun parton de la programo ĉeestis ĉirkaŭ 50 vizitantoj, kiujn salutis kaj bonvenigis sinsekve la direktoro de la biblioteko s-ro **Marinko**



Jozo Lovrić

Iličić, la urbestro de **Bjelovar** s-ro **Antun Korušec** (granda amiko de esperantistoj), la prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo s-ro **Franjo Forjan**, kaj **Josip Pleadin** el Đurđevac. Post la salutparoladoj, la gastoj trarigardis la modernajn kaj bone ekipitajn ejojn de la biblioteko. La tuta grupo poste direktiĝis al la pavilono en la urba parko, kie estis farita komuna foto, kaj poste la gastoj iris piede al la sidejo de **Ĉeĥa komunumo**, kie okazis resto de la programo.

En **Ĉeĥa komunumo** jam atendis ilin manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, per kiuj regalis ilin la funkciulino de la Departemento **Dominka Pretula**. Bongustan kafon kuiris membrinoj de la organiza komitato, kaj en la leĝera atmosfero okazis amikaj interparoloj.

Prezice je la 11h00 komenciĝis la kultura programo per ludado de Esperanta himno. En tre nekutima maniero, uzante drumojn, la Zamenhofan vekpoemon "Al la fratoj", en la kroata traduko de **Nikola Bubalo**, recitis kvar lernantoj de Buroteknika kaj ekonomika lernejo el Bjelovar: **Jakov Grgić**, **Domagoj Stančec**, **Kristijan Koščak** kaj **Bernard Šestak**, dum deflanke kontente observis ilin la profesoro **Marko Dragičević**, kiu trejnigis la grupon, kaj la direktoro de la lernejo s-ro **Vojislav Kranželić**.

Verŝajne unu el la plej kontentaj homoj tiutage estis la prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo, s-ro **Franjo Forjan**, kiu salutis la gastojn, kaj dankis al sponsoroj. Post li, pri la graveco kaj signifo de Zamenhofa tago, festparolis **Josip Pleadin**, la sekretario de Dokumenta Esperanto-Centro.

Programero kiu vekis tre grandan intereson estis la projekciado de la dokumenta filmo "The Universal Language" de usona reĝisoro **Sam Green**, kun Esperantaj subtekstoj.

Post la filmo sekvis poezia parto de la programo, dum kiu profesoro **Zdravko Seleš** deklamis unue la poemon de forpasinta bjelovara poeto kaj esperantisto **Željko Sabol** "*Manringo de mia morta patrino*" (vidu la numeron 6/2011 de "Zagreba Esperantisto", paĝo 182), poste la poemon "*La sango min pelas*" de fama Esperanta mondovojaĝanto **Tibor Sekelj**, omaĝe al kiu Eŭropa Esperanto-Unio proklamis la jaron 2012 "La Jaro de Tibor Sekelj". Permeson por recitado de lia poemo donis la vidvino **Erzsébet Sekelj**, kaj la poemo estas konsiderata lia lasta poemo, verkita nelonge antaŭ la morto.

En la muzika parto prezentiĝis **Vanda Dabac**, la juna bjelovara violonistino, unu el la plej perspektivaj lernantoj de bjelovara muziklernejo, kiu unue akompanis per sia muzikado la regione tre konatan kantistinon **Marica Hasan** el Đurđevac dum kantado de internacie populara kanto "*Mara kolombo*" (La Paloma) en la Esperanta traduko de ĉeĥa esperantisto **Jiří Kořínek**. Poste **Vanda** mem ludis la muzikon de **Johann Sebastian Bach**.

Zamenhofa tago estas konsiderata ankaŭ Tago de Esperanta libro, dum kiu, kompreneble, oni prezentas ankaŭ noveldonitaĵojn. Ĉi-foje, **Mihaela Cik** kompilis longan tekston pri pluraj recenzoj de la trilingva libro "*Sonĝoj kaj ombroj*" de profesoro **Seleš**. La libro aperis ĉi-jare okaze de la 50-jara datreveno de naskiĝo de la aŭtoro, kaj ĝi inkluzivas verkojn en la norma kroata lingvo, en la kajkava dialekto kaj en Esperanto. Ĉar **Mihaela Cik** mem ne partoprenis la aranĝon, partojn el ŝia teksto legis **Grozdana Grubišić-Popović**. (La tutan tekston bonvolu legi ĉi-numere). La verkisto **Seleš** mem deklamis kelkajn poeziajn erojn el sia libro.

Kiel belan donacon okaze

de Tago de Esperanta libro, ĉiuj ĉeestintoj ricevis la kroatigitan verkon de hungara verkisto **Géza Gárdonyi** "Sklavoj de dio". Per tiu libro donacis la ĉeestintojn s-ro **Alesandar Kocian** el Osijek, kiu pere de Esperanto tradukis la romanon al la kroata. Krom la libro, la ĉeestintoj ricevis ankaŭ bildkartojn de Bjelovar, donacitajn de **Turisma asocio** de la urbo, kaj la lastajn tri numerojn de "Zagreba Esperantisto", donacitajn de **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj**.

La lasta programero estis oficiala proklamo de preskaŭ 1000-eŭra donaco, per kiu **Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj** helpas modernigon de la oficeja ilaro de **Dokumenta Esperanto-Centro** en Đurđevac. **Radenko Milošević** (la prezidanto de UZE) kaj **Josip Pleadin** (la sekretario de DEC) subskribis koncernan donackontrakton, kiu ebligas al DEC aĉeti modernan plurfunkcian maŝinon (printilo, fotokopiilo, skanilo), necesegan por funkciado de DEC.

La tutan programon lerte gvidis **Grozdana Grubišić-Popović**.

Post la kultura programo por la gastoj estis organizita abunda tagmanĝo, per kiu la ĉeestintojn regalis la **Urbo Bjeovar** kaj ĝia urbestro **Antun Korušec**.



Ivica Šćepanović
IZLOŽBA FOTOGRAFIJA
ŽIVOT KROZ OBJEKTIV

Narodna knjižnica "Petar Preradović"
Bjelovar
8.-15. prosinca 2012.

Ivica Šćepanović
FOTO-EKSPOZICIO

LA VIVO TRA OBJEKTIVO

Popola biblioteko "Petar Preradović"
Bjelovar
8a - 15a de decembro 2012



Dum la festado oni trinkis, interalie, la speciale enboteligitan "Zamenhofagan vinon", kiun donacis unu el la sponsoroj, s-ro **Josip Kolarević**. Krom la menciitaj institucioj kaj personoj, la aranĝon sponsoris **Popola biblioteko "Petar Preradović"** kaj ĝia direktoro **Marinko Iličić** (ekspoziciaj ejoj kaj projekcia ilaro), **Bakejo "Oškera"** el Rovišće (pano kaj bulkoj), **Kafejo "Zagorje"** kaj ĝia posedanto **Božidar Zagorec** el Bjelovar (kukoj), **"Sambi"**, fabriko de sukoj el Bjelovar (trinkaĵoj), **Ĉeĥa komunumo Bjelovar** (ejo kaj muziko), **Elmex** el Bjelovar (fotokopiado), **Grafokom** el Đurđevac (katalogo, preparo de ekspozicioj kaj grafikaj laboroj), **KTC** el Križevci (kelneroj) kaj pluraj societaj membroj.

Pri la aranĝo skribis ĵurnalistino de la gazeto "Bjelovarac" **Ružica Stojković** en la numero de la 13-a de decembro, kaj mallongan televidan raporton elsendis **Kroata televido** en sia "Departementa panoramo" la 19-an de decembro. Pri aliaj raportoj ni ankoraŭ ne scias.

Oficiala filmisto kaj fotisto estis **Jožo Lovrić**, kiu preparis specialan filmon, mendeblan ĉe la organizantoj. Krome, mendeblas komuna foto kaj kompaktdiso kun okdedo da fotoj.

La organizantoj eldonis specialan Esperantan kantareton, kiu ankoraŭ haveblas.

Kantareto



Zamenhofa tago
Bjelovar

la 15-an de decembro 2012

La vivo tra objektivo

Josip Pleadin (el la ekspozicia katalogo)

Renkontiĝo kun artisto ofte okazas subite, sen speciala anonco ... Simile okazis ankaŭ dum mia unua renkontiĝo kun fotoj de Ivica Šćepanović el Gornji Humac, situanta en la interna, monta parto de la insulo Brač. Laŭ sia okupiĝo pri Esperanto Ivica ĉiukaze estas netipa esperantisto, tiu kiu per nenio elstaras, sed tamen Esperanton vivas plenpulme, malgraŭ la limigoj de la vivo. Averaĝa esperantisto estas en malfrua aĝo, vivanta en granda urbo, estanta membro de loka esperantista societo, kun sufiĉe tradicia komprenado de la esperantista mondo. Ivica, male, estas en sia plej bona aĝo, kaj rilate la naskiĝtagojn kiuj restis post li (li naskiĝis en 1965) kaj rilate sian artistan forton. Li pasigas la vivon de izolita esperantisto en la medio kie aliaj samideanoj ne ekzistas, en loko kun malpli ol 300 loĝantoj, kaj eĉ surinsule, kio per si mem signifas iasencan izolitecon. Tamen, en lian hejmon ofte venas esperantistaj hazardaj vojaĝantoj, ĉar li estas unu el malmultaj membroj de la gastiga reto "Pasporta Servo" en Kroatio.

La sorto volis, ke sian "pli bonan duonon", kun kiu li havas du filojn, Ivica trovu en Litovio. Per sortoludo la familio dividiĝis, kaj tra liaj fotoj ni legas la doloron pro tiu fizika (sed ne anima) dividiteco. Dalia, Mykolas kaj Povilas plue restas objektoj de lia fotado kaj li notas iliajn malĝojajn kaj ĝojajn, pejzaĝojn de Krinĉinas kaj rarajn momentojn pasigitajn kune, egale ĉu en Litovio aŭ sur Brač, ĉar ili estas belegaj momentoj por eterneco.

Daurigo sur la pago 8 ▶





zamenhofa tago -

 Jozo Lovrić





BJELOVAR, 2019



Daurigo el la pagho 5 ▶

En kio troviĝas la diferenco inter metio kaj arto? Metio nutras stomakon, kaj arto animon. Metio estas io kion oni lernas, kaj artotalenton oni ricevas per sia naskiĝo. La nuntempo al fotoarto donacis perfektajn fotilojn, ekipitajn per mirindaj teknologiaj atingajoj, por ke la tasko de fotisto estu nur puŝi butonon. Nuntempe multaj tion ja faras, kaj preskaŭ ne ekzistas nia samtempulo sen pratempa bezono haltigi segmenton da tempo sur foto. Multaj pro tio sukcesis fari teknike bonajn verkojn, sed Ivica, male, en siaj fotoj serĉas ion pli profundan.

Evidente Ivica Ŝećepanović estas ŝatanto de la naturo, aparte de sia hejma tero, ŝtonaro kaj maro. Per sia profesio dum jaroj li okupiĝis pri ŝtono, laborinte en la ŝtonekspluato de "Jadrnkamen" en la proksima loko Pučišća, ĝis ĝia bankroto ĝuste en ĉi tiu malfacila kaj kriza jaro 2012. La reston de sia tempo li okupiĝas per terkulturado, olivoj, vinproduktado, bredado de ŝafoj ... Kiomas la kontrasto inter tiu kamparana kaj laborista vivoj, kompare kun lia artista animo kiu sopiras en la objektivo kapti sunleviĝon, matenan trankvilon sur marvastoj, araneon en frumatena ĉasado, malĝojon sur la vizaĝoj de siaj proksimuloj, roson en la araneaĵo ... Sur liaj fotoj viciĝas konataj insulaj kaj maraj pejzaĝoj, urboj viditaj per okuloj de hazarda vojaĝanto, strangaj homoj kaj ankoraŭ pli strangaj momentoj, ekzemple araneo kiu volas kapti sunsubiron. Antaŭ ni leviĝas la fieraj muregoj de Dubrovnik, la stratoj de Vieno kaj Varsovio, herbetoj kaj insektoj. Sur siaj fotoj Ivica montras apartan inklinton al noktaj scenoj, subiroj kaj aperoj de la suno, ludoj de lumo kaj mallumo.

Evidente Ivica tre ŝatas ankaŭ la tradicion. Liaj fotoj estas plenaj je detaloj de malnovaj domoj, fenestroj kun puntaj

BILDKARTA EKSPOZICIO

 Franjo Forjan

La kutimo kiu jam eksmodiĝis, ekbrilis per nova flamo! Kiu hodiaŭ sendas bildkartojn? Malmultaj, vere! Konfirmas tion kelkaj respondoj el diversaj landoj, ke simple ne eblas trovi bildkarton en ilia urbo!

Troigo pri la virtula mondo, instigis la organizantojn de Zamenhofa tago en Bjelovar reveni al eksmoda kutimo: peti siajn amikojn tra la mondo saluti la feston en Bjelovar per bildkarto de sia

urbo, kiujn oni poste ekspoziciis kaj tiel atentigos pri la internacieco de Esperanto, kaj montras ke ĝi ankoraŭ ne mortis, kiel tion kutimas opinii iuj per demando: "Ĉu tio ankoraŭ ekzistas?" La peto estis dissendita al proksimume 300 retadreso tra la mondo, sed la reĝo superis ĉiujn esperojn de la organizantoj. Venis ĉirkaŭ 120 bildkartoj el trideko da landoj! Vere nekutima afero en tempo de elektronika poŝto. Ĉu tio montras nur ke esperantistoj estas

kurtenoj, putoj, ringoj sur pordoj de kadukaj vestibloj, de ŝtonaj pavimoj, sed ankaŭ de seka tero kaj plugitaj kampoj. Sur pluraj fotoj videblas kampaniloj de lokaj preĝejoj, sed ankaŭ tombejoj, per kio supozeble li volas atesti pri la pasintaj epokoj kaj generacioj de siaj antaŭuloj, kiuj tie trovis sian lastan kvieton. Malnovaj kuirejoj, fiŝoj sur rostokrado, rostostango kun bongusta restajo ... ĉio ĉi respegulas la tradician vivon kiun evidente Ivica pasigas ankaŭ nuntempe, kaj klopodas vivi sammaniere, trovante en ĝi la ĉarmon, kiun grandaj urboj malaperigas. Bedaŭrinde, tia vivo senevite malaperas kaj la notado de ĝiaj "restintaj restoj" estas tre grava ago, ne nur en la arta, sed ankaŭ en la etnografia kaj etnologia sencoj. Aldonate al ĉio ĉi ke Ivica en sia blogo verkas notojn pri la naskiĝvilaĝo kaj la insulo, en la loka ĉakava dialekto kaj en Esperanto, lia rolo transpasas la nurajn lokajn kadrojn, kaj ni povas lin konsideri memproklamita kronikisto de siaj tempo kaj loko.

En lia objektivo sian lokon trovis multaj portretoj, de la

jam menciitaj plejkaruloj (Dalia kaj la filoj), tra maljunuloj kiuj kun sulkiĝinta frunto nombras siajn lastajn horojn en la insula kvieto, ĝis la amikoj kaj kolegoj el "Jadrnkamen", do ĝis tiuj homoj kiuj la blankan ŝtonon de Brač segis kaj donadis ĝin al la mondo, eble al iuj aliaj artistoj. Inter la portretoj troviĝas ankaŭ la memportreto titolita "Mi", sur kiu Ivica, seriozmiene kaj sub franca ĉapo kun nigre-ruĝa kvinpinta stelo, kvazaŭ mesaĝus al la mondo: jen mi, homo el la popolo, militisto, luktanto por laboristaj rajtoj, humanisto per miaj opinio kaj vivado.

Dum tra la naskiĝinsulo li pasas kun sia "Canon"-fotilo en la manoj, kiu scias kiaj pensoj multiĝas en tiu soleca artisto. Liajn fotojn konas nur mallarĝa rondo de liaj amikoj, kaj ni esperas, ke per tiu ĉi ekspozicieto tiun rondon ankaŭ vi plivastigos. Ivica certe meritas tion. El pli ol 200 viditaj fotoj, por ĉi tiu ekspozicio ni elektis hazarde nur tridekon da ili. Eble ĝuste tio estu kaŭzo por denove renkontiĝi kun tiu escepta "malgranda" homo en la estonteco.



neŝanĝeblaj idealistoj, aŭ homoj jam satiĝis de virtualeco, kaj bezonas realecon?

Kia ajn estas la respondo al tiu demando, la ekspozicio prezentita al bjelovaranoj estis loko ĉe kiu ofte haltadis homoj preterpase al bibliotekaj bretoj kun libroj. Haltis tie ankaŭ la urbestro de Bjelovar, kiu esprimis sian aprezon de la esperantista laboro.

Oni devas aparte aplaŭdi al esperantistoj de du landoj, kiuj montris apartan reason al nia invito. Bravo francoj kaj poloj!

En ĉi tiu artikolo ni volas menciigi ĉiujn kies afablajn gratulojn por la Zamenhofa tago ni ricevis.

ALBANIO: Bardhyl Selimi (Tirana); AŬSTRALIO: Nicole Else (Sidney); AŬSTRIO: Bernhard Tuider (Vieno); BELGIO: Roland Rotsaert (Brugge); BOSNIO KAJ HERCEGOVINO: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (Sarajevo), Smail Grbo (Sarajevo); BULGARIO: Esperanto-societo "Sukceso" el Vraca (fondita en 1908); BRAZILO: Esperanto-societo el São Carlos; DANLANDO: Birthe Lapenna (Kopenhago), Esperantoforeningen for Danmark el Kopenhago (Ileana Schrøder); FINNLANDO: Salla (Helsinki), Kristiina Hautamäki (Helsinki), Raita Pyhälä (Hyvinkää); FRANCIO: Jean-Jacques Moreau (La Membrolle), Mirelle Besset (Hauterives), Tereza Sabatier nome de "La Verda Stelo - Esperanto 94" el Choisy-le-Roi, Monique (menciita nek familia nomo nek la urbo), Krešimir Barković (Parizo), Esperanta grupo el Franca Ĵuraso, Françoise Noireau (Sare), Medeleine Foucher (Tours), Pierre kaj Édith Jaffré (Vannes), Club Esperanto de Saint-Etienne (2 kovertoj), Jocelyne Monneret (Chalon-sur-Saône), Laurent (el Esperanta grupo de Angers), Anne Raurich (Avon), Klubo A.L.C Esperanto (Saint-Aignan-de-Grand-Lieu), Lucette Echappé (Nantes),



CCNE Esperanto (Nantes), Astrid (Marseille), Alain Pialla (Lyon), Renee Triolle (Arles), Anne Jausions (prezidantino de OSIEK) el Argenteuil, Esperanto-klubo de La Ciotat, Maryvonne Houvriez nome de Asocio Esperanto Indre (Chateauroux), Monique Prezioso nome de Esperanto Club St. Raphaël, Denise kaj Andre Loisel el Saint Raphaël, Guy Aumasson kaj Jocelyne Monneret el Saint Remy, I. C. Roget el Les Arcs-sur-Argens; GERMANIO: Detlev Blanke (Berlin), Esperanto-societo Sudharco el Herzberg, Rolf Beau nome de ELF-AREK (Schweringen), Vesna Staničić-Burchards (Norderstedt); ITALIO: Sen Rodin (Firenze), Interkultura Esperanto-Centro (Mazara del Vallo), Triesta Esperanto-Asocio, Mario Amadei el Bolonjo; JAPANIO: Hori Jasuo; KANADO: Zdravka Metz kaj Normand Fleury (Montréal); ĈINIO: Daniel Kane (Hong Kong), Augusto Casquero (Kantono); LITOVIO: Esperanto-klubo "Rute" (Šiauliai); LUKSEMBURGIO: István Ertl (Helmdange); HUNGARIO: Adri Pásztor (Miskolc), László Pástor (Miskolc), István Gulyás (Budapest); MAKEDONIO: Naum Celakoski (Skopje), Viktor Galeski (Prilep); MALAJZIO: Nicholas Nevan (la bildkarto bedaŭrinde perdiĝis survoje); NEDERLANDO:

Ed Borsboom nome de Internacia Esperanto-Instituto (Haag); POLLANDO: Pola Esperanto. Asocio, filio en Lodzo, Esperanto-societo Białystok, Andrzej Sochacki (Staszów), Magda Tatara (Kraków), Lodza konversacia rondo, Robert Kamiński (Łódź), Esperanto-klubo Nowy Sącz, Centrum Edukacji Miedzykulturowej en Nowy Sącz, Barbara Pietrzak (ĝenerala sekretario de UEA el Varsovio); RUMANIO: Julia Sigmond (Cluj-Napoca), Mariana Berariu (Gherla); RUSIO: Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin), Jelena Ŝaravina el Krasnojarsk; SLOVAKIO: Stano Marček (Poprad); SERBIO: Kristina Kujundžić (Subotica), Đorđe Dragojlović (Subotica), Adem Jakupović (Beograd); SVEDIO: Kerstin Rohdin (Brandbergen), Klubo "Amika Rondo" Sundsvall; TOGOLANDO: Gbeglo Koffi kaj aliaj.

Ni petas pardonon se ies nomo estis neintence nemenciita. Bonvolu atentigi pri tio la redakcion de "Zagreba Esperantisto" aŭ la organizantojn. Laŭ la decido de la organizantoj, al ĉiuj sendintoj ni reciprokas per bildkarto de nia urbo Bjelovar (kompleze de urba turisma asocio) kaj per ĉi-tiu numero de "Zagreba Esperantisto". Kelkaj ne disponigis al ni sian adreson, pro kio ni ne povas plene konsekvence plenumi la decidon.

TRILINGVAJ "SONĜOJ" DE SELEŠ KIEL SUBTILA PROPAGANDO DE ESPERANTO

✍ Mihaela Cik

Kiam printempe de 2012 aperis la libro de Zdravko Seleš "Snovi i sjene/Senje i tenje/Sonĝoj kaj ombroj" okazis kelkaj ĝiaj prezentoj por kroata kaj Esperanta publikoj, kaj publikigis kelkaj notoj kaj recenzoj pri ĝi. Unu momento en ĉio ĉi estas tre interesa, kaj mi volas iomete preparoli ĝin. Temas pri la Esperanta parto de la libro kaj pri propagando de Esperanto pere de ĝi. Nome, Seleš jam en 1991 eldonis la dulingvan kroatan-Esperantan poemaron "Noćnik – Noktulo", kaj tiel, tradukinte mem siajn kroatlingvajn poemojn, li akcentis sian esperantistecan, kaj al siaj tiamaj legantojn donis ian informon pri Esperanto, sed, normale, li samtempe celis la Esperantan legantaron. La plej nova libro de Seleš estas eĉ trilingva, kaj ĉiuj ĝisnunaj recenzintoj uzas la enkondukan tekston de la aŭtoro rekonante en ĝi akcentadon de tiu momento. Ĉi tie, baze de tiuj tekstoj, ni esploros eblan akceptadon de la Esperantaj libropartoj, precipe ĉe neesperanta publiko.

"Mi sonĝas, pensas kaj verkas en tri lingvoj", diras nia gimnazia profesoro Zdravko Seleš en la enkonduko de sia libro "Snovi i sjene/Senje i tenje/Sonĝoj kaj ombroj", kiu aperis okaze de la 50-a datreveno de lia naskiĝo (...) La libro "Sonĝoj kaj ombroj" estas elekto el la 30-jara literatura kreado en la kajkava dialekto, kroata lingvo kaj internacia lingvo Esperanto. Temas pri lingvoj de lia infanaĝo, de lia unua kontakto kun la poezio de Fran Galović, de lia nokta legado kaj engaĝita tradukado,



✎ Jozo Lovrić

verkado de eseoj kaj recenzoj" – skribis en la noto "LEPO SENJAJ I TO BO DOST!" (Bele sonĝu kaj tio sufiĉos) por la gazeto de ĝurĝevaca gimnazio abiturientino Anja Senjan. La komencon de la sama teksto citas ankaŭ Zlatoje Martinov en sia recenzo nomita "LA POEZIO DE SUBTILA LIRISMO": "Mi sonĝas, pensas kaj verkas en tri lingvoj. Ĉiuj tri estas malgrandaj kaj tial mi ne povas forlasi iun ajn el ili, tial al mi gravas ĉiuj tri", diras la aŭtoro en la enkonduka vorto de sia libro, kiu estas siaspeca miksaĵo de poezio kaj prozo verkita en la kroata literatura lingvo, kajkava dialekto kaj Esperanto." Samtiel Mario

Kolar en la recenzo "MALGRANDA LITERATURA RETROSPEKTIVO DE ZDRAVKO SELEŠ" verkita por la kroata revuo "KAJ", firmigas siajn konkludojn citante el la enkonduka teksto: "...se ni ekiras jam de la trilingva titolo aŭ nur preterfluge trafoliumas la libron, klariĝas ke temas pri trilingva verkisto. En la konciza enkonduka teksto, kiu estas skribita kajkave, la aŭtoro atentiga pri la fakto ke "Ja ne temas pri libro kun tradukoj. Temas pri la libro en miaj tri lingvoj en kiuj mi verkas, pensas kaj sonĝas!". Alivorte, la aŭtoro povas forlasi nenium el la tri lingvoj: la kajkavan en kiu li naskiĝis kaj en kiu vivas, la norman lingvon kiun li vivas kaj Esperanton kiu estas "ideo pri pli bona mondo" kaj li "povas forlasi nek la ideon nek la lingvon", sed li sentas ilin ĉiujn la siaj."

La enkonduka teksto estas en la libro kajkavlingva kaj Esperanta kaj, kvankam en la poezia parto de la libro (cetere la plej granda) plej gravas la kajkava parto, dum la Esperanta parto aperas ĉefe en la antaŭe tradukitaj poemoj el "Noćnik – Noktulo", en la novotradukita prozopoemo "Elegioj de Sigismundo Ernušt" kaj nur en kelkaj originalaj poemoj, la mozaika strukturo de la libro kaj la elekto de tekstoj malkaŝas kiom al la aŭtoro gravas Esperanto kaj interagado de liaj literaturaj etapoj kaj literaturaj kampoj en kiuj li kreas, nome de la nacia literaturo al kiu li apartenas laŭ sia naskiĝo kaj la Esperanta, kiun li elektis per sia aparteno al la Esperanta movado. Tiel Kolar skribis: "Zdravko Seleš

kaj antaŭ kaj post la premiita libro "Elegioj de Sigismundo Ernuŝta" kontinue, sed diskrete, per variaj literaturaj kaj al literaturo ligitaj verkoj dispersitaj en gazetoj kaj almanakoj kaj kolektitaj en du malpli grandaj libroj, ĉeestas en la literaturaj scenejoj, antaŭ ĉio la podravina, kajkava kaj Esperanta (...). Nome, krom ke per verkado de poezio kaj iom malpli de prozo en la tri menciitaj lingvoj, en ĉiuj tri, kio pli raras, li verkis kaj kritikojn kaj eseajn tekstojn, kaj krome li tradukis el kaj al ĉiuj tri." Kolar sian intereson vastigas ankaŭ al Esperantaj literaturhistoriaj faktoj: "Seleŝ apartenas al rondo de tre gravaj kroataj Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj, speciale de la podravina-ĝurĝevaca rondo (Đuro Rašan, Josip Pleadin, Antun Šimunić, Velimir Piškorec), kies unu el la ĉefaj animantoj li estas, siatempe ankaŭ estinte redaktoro de unu el nemultaj kroataj kultur-literaturaj gazetoj (Koko, Đurđevac, 1988-1990). La kajkava kaj la Esperanta kreadoj de Seleŝ ĝis nun estas antologiitaj en la antologioj de kajkava poezio "Rieči sa zviranjka" (1999) de Joža Škok kaj en "Zercalo horvacko" (1999) de Ivan Kutnjak, kaj en la antologio de kroata Esperanta poezio "Kroatia Esperanta poemaro" (1991)."

Kolar en sia tre pristudita kaj detala teksto okupiĝas ankaŭ per konkretaj reĥoj de tiu agado de Seleŝ inkluditaj en ĉi tiun libron, kaj tial li diras: "La tradukan verkaron en la libro, Seleŝ al ni prezentas per la bonega traduko de "Legendo pri birdnesto" de Selma Lagerlöf tradukita el Esperanto al la kroata, kaj el sia esea kaj kritika verkaro, ene de kiu, interalie, ĝis nun li pleje elstaris per la panoramo *Lirika đurđevačke Podravine* (2003.) – ĝis nun la sola poeziporamo de tiu regiono – Seleŝ por la libro elektis eseojn pri la bardo de kroata poezio Dragutin Tadijanović kaj pri la hejmgregiona verkisto Đuro

Rašan el *Novigrad Podravski*, kun kiu li dividas la saman trilingvan sorton."

La teksto pri Dragutin Tadijanović origine, en la jaro 2007, estis verkita en Esperanto, kaj por ĉi tiu libro ĝi estis tradukita en la kroatan norman lingvon. Tio denove atestas pri la aŭtora deziro, ke sian Esperantan etapon, kiu parte estas ankaŭ kontribuo al la promociado de la nacia kulturo en la internaciaj rondoj, li prezentu ankaŭ al la kroata publiko. Estas interese, ke neniu el la recenzintoj menciis la plej ofte publikigitan, kaj dufoje antologiitan kajkavan poemon "Lumportanto" (*Lampaŝonosec* - laŭvorte tradukita: *Lanternoportanto*), kies gravecon la aŭtoro akcentis tradukinte ĝin Esperanten. Temas pri unu el la plej bonaj kaj plej gravaj poemoj de Seleŝ, kun tipe pensa-filozofia temaro pri sindemando rilate la sencon de la homa vivado kaj liaj pensoj, kiu estis verkita en formo de mallonga prozpoemo, kio estas unu el la rekonablaj karakterizaĵoj de la aŭtoro.

LUMOPORTANTO

Ĉiuvespere mi rigardas kiel li iras tra la kampo. Portante lanternon. Trans la stoplejo. Tra l' densa, glueca mallumo. Kien li iras? Kion li serĉas?

Dum matenruĝo, li ankoraŭ portas sian lumon, tra la obskura, kruda mondo. Kvankam tagiĝas, kaj la Suno eliras, la homo estas en malhelo stumblanta, li havas vunditajn manojn, krustokovritajn genuojn kaj krevitan koron. Kien li iras? Kion li serĉas?

Zlatoje Martinov en sia teksto verkita en la Esperanta versio por "Literatura Foiro" kaj, origine por "Zagreba Esperantisto" (publikigita tamen en "Tempo"), kaj en la varianto por la serba literatura revuo "Sveske" en la serba lingvo,

pli da atento dediĉis al la prezento de la poeziado de Seleŝ, kaj li, instigita per rememoroj pri sia propra kajkava epizodo en la infanaĝo, multe da atento dediĉis al la kajkava libroparto, pri kiu, interalie, li skribis: "Tiu ĉi idiliaj bildoj, pastoraloj fakte, estas esprimitaj per lapidara lingvo, per lingvo-dialekto kiu pli kaj pli malaperadas. Oni havas impreson ke Seleŝ, kiu parton de sia poeta kreado dediĉas ĝuste al la kajkava lingvo, ne devas speciale serĉi la esprimrimedojn, ili simple mem aperas sekvante la aŭtorajn pensojn kaj sentojn. Ekirante el la fakto ke la poezikerno troviĝas en la lingvo en kiu la poezio naskiĝas, Seleŝ en ĝin enspiris ian specialan rudimentan forton, kiu fakte ebligas al li disciplini sian poetan penson je lapidara kaj kompakta verso. Vere estas granda scipovo esprimi tiom da grandvaloraĵoj el la riĉega kultura tradicio de iu regiono, de iu lingvo, eĉ se tiu lingvo havas karakteron de dialekto. (Sed ĉiu dialekto eĉ la plej malvaste parolata, fakte estas memstara lingvo, la nomo „dialekto“ estas tamen simpla lingvistika konvencio). (...) Verkitan kajkavlingve kaj fare de la aŭtoro tradukitan Esperanten, la elegion (fakte: poemon, rim.aŭt.) povus legi ankaŭ tiuj kiuj konas la internacian lingvon."

Ĉar Martinov estas ankaŭ esperantisto, en la poezia parto li tamen elstarigis ankaŭ ĝian Esperantan etapon, kiun li finas per interesa konstato: "En la libro troviĝas ankaŭ kelkaj poemoj originale verkita (versitaj) en Esperanto. Inter ili la plej impresiva sendube estas poemo Nun mia patro en la Ĉielo. La doloron pro la patra morto trankviligas la ekscio pri la eterna paco tie, en la Ĉielo "ĉe nia patro en la Ĉielo", pri mildeco kaj senzorgeco de la eterna vivo. Tamen, kredas la poeto, lia patro mem atenteme aŭskultas preĝojn de la filo al la Patro en Ĉielo. La poemo sendube meritas esti

tradukita ankaŭ kroatlingven, se ĝi jam ne estas enkroatigita.“ Martinov do konstatas, ke la interrilatoj de la Esperanta kaj kroata lingvoj en la verkaro de Seleš povus esti daŭrigataj ankaŭ en la ĝis nun, en la poezia parto de lia verkado, neuzita direkto.

Ni finu citante denove (same la finon) de la recenzo de Kolar: "Kolektinte en ĉi tiu libro la plej signifajn?/la plej gravajn?/la plej karajn? partojn de sia ĝisnuna kreado, samtempe de la poezia, proza, traduka kaj esea, Seleš prezentiĝas al ni kiel interesa kaj universala kreanto, samtempe en la tri ("malgrandaj") lingvoj. Sed, kvankam ĉi tiu libro fakte prezentas siaspecan ĝisnunan finkalkulon, en ĝi ekzistas ankaŭ anoncoj pri novaj entreprenoj, kion ĉiukaze de tiu ĉi aŭtoro ni ankaŭ atendas." Jes, ni atendas novajn verkojn, sed ankaŭ pluan kunvivadon de la tri lingvoj, ĉe kio Esperanto eble ricevos eĉ pli gravan etapon. Sed, egale ni estas tre kontentaj, ĉar en la mondon ekiris la libro kiu je subtila poezia, traduka kaj esea manieroj atestas pri Esperanto kiel literatura lingvo, lingvo-ponto, lingvo en kiu, samkiel en aliaj lingvoj, oni povas "sonĝi, pensi kaj verki".



DUM LA NOKTO LA RATOJ JA DORMAS

(Originala titolo: *Nachts schlafen die Ratten doch*)

 **Wolfgang Borchert (1921-1947)**

Tradukis: Armin Grötzner

La kava fenestro en la solecigita muro oscedis bluruĝe plena da frua vespersuno. Polvonubaĵo trembrilis inter la krute rektiĝantaj restaĵoj de la kamentuboj. La rubodezerto somnoladis.

Li tenis la okulojn fermitaj. Subite malheliĝis ankoraŭ plie. Li rimarkis, ke iu estis alveninta kaj staris nun antaŭ li, mallume, mallaŭte. Nun ili kaptis min! Li pensis. Sed kiam li iomete okulumis, li vidis nur du iom mizere pantalonumitajn gambojn. Tiuj staris antaŭ li sufiĉe kurbaĵ, tiel ke li povis trarigardi inter ili. Li riskis etan palpebrumon supren laŭ la pantalonaj kruoj kaj perceptis iom maljunan viron. Ĉi tiu havis en la mano tranĉilon kaj korbbon. Kaj iomete da tero ĉe la fingropintoj.

Vi eble dormas ĉi tie, ĉu? Demandis la viro kaj rigardis malsupren sur la pelmelon de la hararo. Jürgen palpebrumis tra inter la gamboj de la viro en la sunon kaj diris: Ne, mi ne dormas. Mi devas atenti ĉi tie. La viro kapjesis: Do, pro tio vi verŝajne havas jen la grandan bastonon.

Jes, Jürgen kuraĝe respondis kaj firme tenis la bastonon.

Pri kio vi do atentat? Mi ne povas diri tion. Li tenis la manojn firme ĉirkaŭ la bastono. Aspiras eble monon, ĉu? La viro demetis la korbbon kaj purviŝis la tranĉilon tien

kaj reen ĉe la pugo de la pantalonon.

Ne, monon tute ne, Jürgen diris malestime. Pri io tute alia.

Nu, kio do?

Mi ne povas diri ĝin. Ĝuste io alia.

Nu, tiam ne. Do memkompreneble ankaŭ mi ne diras, kion mi havas ĉi tie en la korbo. La viro puŝis la piedon kontraŭ la korbo kaj firmklapis la tranĉilon.

Pa, mi povas imagi, kio estas en la korbo, Jürgen eligis malŝate, furaĝo por kunikloj.

Fulmotondro, jes! Diris la viro mirigite, vi estas ja vigla ulo.

Kiun aĝon vi jam havas?

Naŭ.

Oho, imagu, naŭ do. Sekve vi ja ankaŭ scias, kiom estas trioble naŭ, ĉu?

Klare, diris Jürgen kaj por gajni tempon, li adiciis: Tio estas ja tute facile. Kaj li rigardis tra inter la gamboj de la viro. Trioble naŭ, ĉu ne? li demandis ankoraŭfoje, dudeksep. Tion mi sciis tuj.

Prave, diris la viro, precize tiom da kunikloj mi havas.

Jürgen faris rondan buŝon: ĉu dudeksep?

Vi rajtas vidi ilin. Multaj estas ankoraŭ tute junaj. Ĉu vi deziras?

Sed mi ne povas. Mi ja devas atenti, diris Jürgen ŝancele.

Ĉu ĉiam? Demandis la viro, ĉu ankaŭ dum la nokto?

Ankaŭ dumnokte. Ĉiam. Jürgen rigardis supren laŭ la kurbaj gamboj. Jam ek de la sabato, li flustris.

Sed ĉu vi do neniam iras hejmen? Vi ja devas manĝi.

Jürgen levis ŝtonon. Jen kuŝis duona pano. Kaj ladoskatolo.

Vi fumas, ĉu? Demandis la viro, ĉu vi do havas pipon?

Jürgen firmtenis sian bastonon kaj diris timide: Mi ruligas. Pipon mi ne ŝatas.

Domaĝe, la viro klinis sin al sia korbo, la kuniklojn vi povintus trankvile spekti. Antaŭ ĉio la idetojn. Eble vi estus elektinta unu. Sed vi ja ne povas for de ĉi tie.

Ne, diris Jürgen triste, ne ne.

La viro suprenprenis la korbon kaj rektigis sin. Nu jes, se vi devas resti – domaĝe. Kaj li turniĝis. Se vi ne perfidas min, Jürgen nun diris rapide, estas pro la ratoj. La kurbaj gamboj revenis unu paŝon: Pro la ratoj?

Jes, ili ja manĝas de la mortintoj. De homoj. Per tio ili ja vivas.

Kiu diras tion?

Nia instruisto.

Kaj vi do atentis pri la ratoj, ĉu? demandis la viro.

Sed ne pri tiuj! Kaj tiam li diris tute mallaŭte: Mia frato, ĉar tiu kuŝas tie ĉi sube. Jen. Jürgen montris per la bastono al la kunsinkintaj muroj. Nia domo ricevis bombon. Subite ekmanĝis la lumo en la kelo. Kaj ankaŭ li. Ni vokis ankoraŭ. Li estis multe pli juna ol mi. Nur kvar. Li ja devas esti ĉi tie. Ĉar li estas multe pli juna ol mi.

La viro rigardis de supre sur la harpelmelon. Sed tiam li subite diris: Ha, ĉu via instruisto ne diris al vi, ke la ratoj dumnokte dormas?

Ne, flustris Jürgen kaj aspektis subite tre laca, tion li ne diris.

Nu, diris la viro, kia ulo estas la instruisto, se li eĉ

ne scias tion. Dum la nokto ja dormas la ratoj. Dum la nokto vi povas trankvile iri hejmen. Dum la nokto ili ĉiam dormas. Jam kiam malheliĝas

Jürgen faris per sia bastono etajn pelvojn en la rubon. Multe da etaj litoj estas tio, li pensis, ĉio etaj litoj. Tiam la viro diris (kaj dume liaj kurbaj kruroj estis tute ekscititaj): Ĉu vi scias ion? Nun mi manĝigas rapide miajn kuniklojn kaj kiam malheliĝas, mi venos por kunpreni vin. Eble mi povos kunporti unu. Malgrandan aŭ, kion vi opinias?

Jürgen faris etajn pelvojn en la rubon. Ĉio etaj kunikloj. Blankaj, grizaj, blanke grizaj. Mi ne scias, li diris nallaŭte kaj rigardis al la kurbaj gamboj, se ili fakte dormas dum la nokto.

La viro grimpis super la murrestaĵoj sur la straton. Memkompreneble, li diris de tie, via instruisto prenu sian pakajon, se li eĉ ne scias tion.

Tiam Jürgen ekstaris kaj demandis: Ĉu, se mi povus ricevi unu? Eble iun blankan?

Mi do volas provi, vokis la viro jam forirante, sed dume vi devas atendi ĉi tie. Tiam mi iros kun vi hejmen, ĉu? Mi ja devas klarigi al via patro, kiamaniere kuniklostalo konstruendas. Ĉar tion vi ambaŭ ja devas scii.

Jes, vokis Jürgen, mi atendas. Mi ja devas ankoraŭ atenti, ĝis malheliĝas. Mi atentos certe. Kaj li vokis: Ni havas ankoraŭ bredojn hejme. Kestobredojn, li vokis.

Sed tion la viro jam ne plu aŭdis. Li kuris kun siaj kurbaj kruroj renkonte al la suno. Tiu jam estis ruĝa pro la vespero kaj Jürgen povis vidi, kiel ĝi brilis tra la gamboj, tiom kurbaj ili estis. Kaj la korbo ŝanceliĝis ekscite de unu flanko al la alia. Furaĝo por la kunikloj estis ene. Verda furaĝo, tiu estis iom griza pro la rubo.

APEROS DU NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ DE TIBOR SEKELJ

Dokumenta Esperanto-Centro kaj “Gra-fokom” el Ĵurĉevac anoncas aperon de du novaj libroj de Tibor Sekelj en Esperanto dum la kuranta jaro (2013).

Por fino de marto estas preparata eldono de porinfana libro “**Padma, la eta dancistino**”, kies eventoj okazas en la urbo Kondapur en Hindio. La teksto estas jam finkompostita.

La dua libro estas “**De Patagonio ĝis Alasko**”, kies originalo estas verkita en la serbokroata lingvo. Temas pri 41 rakontoj pri interesaĵoj el la vojaĝoj de Tibor en diversaj landoj. Por traduki la libron, kolektiĝis teamo de pluraj tradukantoj, kaj la tradukado jam komenciĝis. La eldonanto volas inkluzivi en ĉi tiun komunan projekton kiel eble pli da kroataj, serbaj kaj bosniaj tradukantoj. La laboro estas volontula, sed ĝia celo estas montri kiel per komunaj fortoj oni povas fari ankaŭ bonan laboron. Interesiĝantoj pri tradukado, bonvolu kontakti dec.kroatio@gmail.com kiel eble plej baldaŭ. Apero de la dua libro estas planata por la fino de 2013.

Miroslav Krleža

EĈ INTER FLOROJ LA JUST' NE REGAS

*Eĉ inter floroj la just' ne regas,
diris tion al violo
plantag' fetora, malbelega,
kaj envia ĝis medolo.*

*Estas bele, bele mienas,
ho, violo bonodora,
kiam pav' sur pado mola
en ĝarden' promenas.*

*Malfacilas ja al ni
dum la paŝt' kokina,
kun kuskut' kaj rusk'-ravina,
vere trista kompani'.
Heliantoj, rosmareno,
bedo plena de dalioj.
Trapeolo, majorano,
odoras je marcipano.*

*De narciso, povra flor',
ofte venas kapdolor'.
Urtiko mordas, verbask'-folio
odoras kiel eŭforbio.*

*Ranunkol', cirsi', glekomo,
ne plaĉas eĉ al kato en la domo.
Kiel karbunklo ili fetoras,
kiel verben' malbonodoras,
por nenio ili servas al la homo.*

*Sed en balzamino
kiel en lulilo,
dormas la eta Jesu',
en karekso kaj kelidonio,
en la memama cikorio
kaj azaro, ja estas nenio.*

*Antirino, globulario kaj konvolvulo,
aŭdis la plantagon plendi kiel stultulo.
Kaj diris la globulario: - vi estas stulta ulo,
estu ja tiel, laŭ dia postulo!*

*Mi 'stas nek rozo nek miozoto,
nek hiacinto, nek siringo, nek admirala flor'!
Mi 'stas humila globulario, kaj ne odora leersi',
feliĉas mi kiel globulario, ĉar Galate' ne estas mi!*

*Kaj diris la plantago, dolĉa vi sinjoreto
donu al mi iun tuthumilan pardoneton,
se al ĉiu mi ne faras kapbalancon!*

*Vi en ĝarden' odoras, kiel trikoloretoj,
nin bekplukas la paseroj kaj birdoj.
Sur nin bovino pisas kaj cigano fekas.
Sur viaj littukoj la dia fileto kuŝas,
la agropiron kaj plantagon eĉ diablo ne tuŝas.*

*Sed se tielas, ke en la mond' devas esti tiel
ke por iuj bovino kaj cigan' fetoras,
kaj la aliaj ĝardene kiel admiral' odoras,
se devas esti tiel, tiam estu tiel,
kaj mi kiel enviul', malsatul', stultul', sen pent'
metos sur la ĉapelon flamantan ruĝan papavon,
kaj tiam venu la vent', la griza, norda vent'!*

*Nordvento, kaprinŝiranto, la tim' de serpentoj
kaj ranidoj,
dispelos jam farbojn desur viaj kalsonoj,
kaj al ni egalos, ni 'stas ja kampara herbaĉ',
vaguloj, plantagoj kaj bovina fekaĵ'!*

El la kajkava dialekto de la kroata
esperantigis Ivo Borovečki



Miroslav Krleža

NI MED CVETJEM NI PRAVICE

*Ni med cvetjem ni pravice,
rekel to je fjojlice
smardlivi terputec,
jalnuš, tvardogutec.*

*Lepe ti je, lepe ti je,
fjojlice dišeče,
kad se pava po stezice
prek gartlica šeče.*

*Teške je nam, teške je nam
na kokošjoj paši,
s prepunčencom, z grintom, z ternom,
žalosnimi pajdaši.
Sunčanice, rožmarin,
leha puna georgin.
Mačuhica, franciškan,
dišiju kak marcipan.*

*Glavobolka, bogi cvet,
glava zna od nje bolet.
Kopriva grize, a lopuh,
kak kačje mleko ima duh.*

*Žabnjak, osjak i peršin soldački,
se te plante nečeju ni mački.
Kak mozul imeju vonjhu,
kak smardlivi spuriš,
od njih nigdo nigdar je ne imel niš.*

*Dok v božje plahtice,
kakti vu zibčice,
Isusek mali spi,
v cinduli i šašu
v puhlivem jandrašu,
v kopitnjaku, trubentice,
niščega ni.*

*Zajček, gumbek, bažulek i slak,
čuli su terpuca, kak punta se bedak.
Pak rekel je gumbek: - ti si bedak,
to je tak vola božja, pak ima biti tak!*

*Ni ja nis roža ni fergismajniht,
ni dijacint, ni holer, ni admiralov cvet!
Ja priklonit sem gumbek, a nis dišeča teja,
pak srečen sem kak gumbek, kad nis Galateja!*

*A rekel je terputec, slatki vi gosponček,
naj daju mi jen preponizni pardonček,
kajti ja ne klimam sakom kakti zvonček!*

*Vi v gartlicu dišite, kakti mačuhice,
a nas pak zoblu vrapci i tice krilatice.
Po nami smrade krave i cigan se posce,
na kačino mleko, na zimolezine.
Vu plahticam vašim božje dete spi,
na piriku, terpuca ni vrag ne gledi.*

*Ak pak će bi tak, da na svetu biti ima tak
da na jenog krava i cigan se sce,
a drugi pak v gartlicu kak admiral diše,
če ima biti tak, naj onda bu tak,
a ja kak jalnuš, gladnuš i bedak,
del si bum za škrilak, goreči čerleni mak,
pak nek dojde veter, sivi severnjak!*

*Severec, kozoderec, skunkačov strah i kač,
raznesel bu vre farbe s pisanih vaših gač,
a nami bu sejeno, mi tak sme polski drač,
bezpuci, terpuci i kravji kolač!*

INTERVJUE KUN OSMO BULLER



La Ĝenerala Direktoro de Universala Esperanto-Asocio, s-ro Osmo Buller, komence de nova laborjaro, bonvolis respondi al demandoj de la redakcio de “Zagreba Esperantisto”, kiuj rilatas la aktualan staton de la Esperanto-movado kaj funkciado de UEA.

ZE: Estimata sinjoro direktoro, ni dankas al vi ĉar vi akceptis respondi al kelkaj niaj demandoj. Finiĝis la jaro 2012, dum kiu ni festis la 125-an datrevenon de Esperanto. Ĉu vi povus, el via vidpunkto, resumi la plej grandajn sukcesojn de UEA kaj de la Esperanto-movado en tiu jaro?

- Mi estas singarda, kiam temas pri tro freŝaj aferoj, ĉar nur tempo montros, kio vere estis grava kaj kio nur ŝajnis tia. La plej preparolita atingo en 2012 estis la aldono de Esperanto al la tradukilo de Google. Tamen, post 10 jaroj oni eble vidos la multecon de junaj vjetnamoj en la Hanoja UK kaj la aktivecon en Indonezio kiel pli gravajn indikojn pri la progreso de nia movado kaj malmultaj memoros, kio estis Google.

ZE: Kiuj, laŭ vi, estas la plej grandaj malsukcesoj en 2012?

- Sufiĉas menciigi la malkreskon de la membraro de UEA. Ĝi estas la kristaliĝo de ĉiuj

malsukcesoj kaj la plej fidinda mezurilo pri la progreso de nia movado.

ZE: Kelkaj temoj ĉi-momente okupas atenton de la membraro de UEA. Unu el la plej gravaj certe estas la malkresko de la membraro. Kiom vi vidas kiel kaŭzojn de tiu tendenco? Ĉu UEA havas strategion por kreskigi la membraron kaj kiel la esperantistoj mem povas agi por haltigi pluan malkreskon.

- La malkresko havas multajn kaŭzojn. Unu estas la malkresko de membriĝemo en interreta epoko. Oni tamen facile prenas ĝin kiel ion superfortan kaj eĉ kiel pretekston, kvazaŭ membrovarbado estus vana kaj eĉ malmodernaĵo. UEA tamen perdas membrojn ankaŭ nur pro tio, ke ili forgesas aŭ ne scias kiel pagi la kotizon, kaj neniu memorigas kaj helpas ilin. UEA-membreco estas kiel ĉiu varo aŭ servo: ju pli ofte kaj vaste oni ofertas ĝin, des pli ĝi vendiĝas. Eĉ se estus malpli da esperantistoj en t.n. pagipovaj landoj, la membraro ja povus kreski, se oni prenis la

varbadon serioze. Ŝajne ne ĉiuj estas motivitaj por fari tion, ĉar ill iel senesperigis. Ni esperu, ke post Rejkjaviko la novaj strategia plano kaj Estraro de UEA redonos al ili la motivigojn.

ZE: Proksimiĝas la elektoj por B-komitatoj. Ĉu vi prognozadas ke estos sufiĉe da kandidatoj? Ĉu esti membro de la Komitato estas populara funkcio, volonte akceptata de gravaj movadaj aktivuloj?

- Populara funkcio ĝi bedaŭrinde ne estas, sed mi ja kredas, ke estos pli da kandidatoj ol lokoj. Multaj aktivuloj ĉiukaze restas ekster la Komitato, eĉ se ili pretus eniri ĝin, ĉar B-komitatoj ne povas esti pli ol ses. Multaj kapabluloj ankaŭ ne aktivigas en landa asocio kaj do ne povas fariĝi A-komitatoj. Feliĉe almenaŭ kelkaj povas esti elektitaj kiel C-komitatoj.

ZE: La oficiala organo de UEA kaj ĝia redaktoro estis sufiĉe kritikataj, sed la kritikoj ŝajne silentiĝis? Ĉu la kritikantoj laciĝis, aŭ pliboniĝis la redakta politiko kiun oni kritikis?

- Eble la kritikantoj ne fariĝis pli kontentaj, sed la kritiko ja okazis en ondoj kaj nun eble estas paŭzo, post kiu la kritiko revenos. La redakta politiko ja ne ŝanĝiĝis radikale, ĉar la Estraro ne vidis tian bezonon.

ZE: Kion vi opinias pri la informa influo de sendependaj interretaj portaloj, kia estas, ekzemple, "Libera folio"? Ĉu ili prezentas la veran demokratian solvon de informado, aŭ kelkfoje ili estas misuzataj flanke de komentantoj?

- Ĉu oni ŝatas ilin aŭ ne, ili fariĝis nemalhavebla parto ankaŭ en la Esperanta mondo. Kompreneble aperas aĉaĵoj, kies manko estus pli bona kontribuo al la informado, sed mi fidas, ke la publiko scias taksu ilin laŭ ilia valoro. Pli damaĝa estas la ofte malalta lingva nivelo en la reto. Pri tio suferas ankaŭ la Esperanta Vikipedio. "Libera folio" elstaras pro la profesieco de sia redaktado. La redaktoro ne nur estas profesiulo, sed kiel eksa estrarano de UEA li bone konas la movadon kaj komprenas ekzemple la funkciadon de UEA. Tial niaj movadestroj -- ankaŭ mi -- ofte sentas sin malkomforte kun li, ĉar li scias, pri kio li demandas. Por demokratio tio nur bonas.

ZE: Jam de pluraj jaroj regas krizo de "Pasporta Servo"? Ĉu vi opinias ke TEJO kiel organizo estas sufiĉe forta kaj ekipita por reorganizi ĝin? Kiaj cetere estas la nuntempaj rilatoj inter TEJO kaj UEA?

- TEJO devas esti kapabla por reorganizi tiun servon, kiu estas unu el ĝiaj ĉefaj kolonoj

apud IJK kaj "Kontakto", kaj mi ankaŭ kredas, ke ĝi kapablos fari tion. La rilatoj inter TEJO kaj UEA estas bonaj. Ekzemple la ideo pri ebla jura memstarigo de TEJO ne aperis pro malbonaj rilatoj sed pro pure formalaj kialoj.

ZE: La malstabila situacio en Israelo zorgigas. Ĉu ĝi povas esti akceptebla atmosfero por organizi IJK-on en tiu lando? Aŭ oni preferu lernu el la pasinteco?

- Israelo estas tre riska loko por kongresoj, pri kies okazigo oni devas decidi longe antaŭe. TEJO tamen prenis la riskon kaj mi esperas, ke ĉio iros bone.

ZE: Laŭ la statistikoj de kelkaj pasintaj jaroj, ankaŭ la nombro de kongresanoj de UK-oj malkreskas? Ĉu tio ligiĝas al ĝenerala malkresko de la membraro, al ekonomia krizo, al eksmodiĝo de la UK, aŭ la vera kaŭzo kuŝas en io tute alia?

- La malkresko de la membraro kaj UK-oj estas parte sama afero, ĉar multaj membriĝas nur, kiam ili aliĝas al UK. La ĉefa merkato de UK-oj plu estas eŭropaj esperantistoj, sed ilia nombro bedaŭrinde malkreskis. Krome, la lastaj UK-oj suferis pro la ekonomia krizo, same kiel internacia turismo ĝenerale. La UK-oj en la ekstereŭropaj Havano kaj Hanojo kaj en la multekosta Kopenhago ankaŭ sen la krizo estus malpli grandaj, sed la krizo faris plian tranĉon en la statistiko. Se la UK estus jam eksmoda, la nombroj estus eĉ pli malgrandaj, sed ĝi ne eksmodiĝis.

ZE: Kroatajn esperantistojn aparte interesas la kandidatiĝo de Kroata Esperanto-Ligo por gastigi UK-on post la jaro 2015. Ĉu tia propono jam alvenis al Roterdamo? Kia estas la perspektivo ke la kongreso en Zagrebo denove realiĝu? Ĉar vi jam konas la situacion en Zagrebo, pro via esplorvizito antaŭ la 86-a UK, kio laŭ vi, povus esti la plej grandaj mankoj de Zagrebo kaj kio ĝiaj avantaĝoj? Kiam vi planas viziti Kroation por esplori ĝiajn eblecojn?

- Formala kandidatiĝo ne venis, sed invito el lando, kiu havas fortan movadon kaj multajn kapablajn aktivulojn, ĉiam estas serioze konsiderata. Por esplorvojaĝo mi bezonas komision de la Estraro de UEA, kiu siavice unue bezonos oficialan inviton de KEL. Sen pensi pri mankoj kaj avantaĝoj de Zagrebo mi povas diri, ke urbo, kiu dufoje gastigis la UK-on, kapablu gastigi ĝin ankaŭ trian fojon, sed tiuj antaŭaj fojoj povus esti "malavantaĝo", se pri sama jaro rivalus lando, kie UK neniam okazis.

ZE: Koran dankon pro viaj respondoj!

KIAL NENIU EN SUD-ORIENTA EŬROPO VOLAS STARIGI FORTAN LANDAN ASOCION

 Renato Corsetti

Mi ne scias kaj mi eĉ ne estas sud-orient-eŭropano sed nur sud-eŭropano. Tamen estas rimarkinda fakto, ke kelkaj fortaj landaj asocioj en Sud-orient-eŭropo ekzistis nur en la tempo de fortaj centristaj registaroj. Mi nun pensas pri Bulgarujo aŭ Jugoslavujo en la komunisma periodo.

Mi devas tamen klopodi listigi la kialojn pro kiuj verŝajne ne ekzistas fortaj landaj asocioj en Sud-orient-eŭropo, kiom ajn tiuj kialoj estas veraj.

- Ĉar forta centra landa asocio pensigas pri la tempoj, kiam estis forta centra registaro, kaj ni ne ŝatas tiujn tempojn. Ni estas liberaj finfine, ĉu ne? Do, ĉiu zorgu pri si mem!

- Ĉar finfine ni estas sudeŭropanoj kaj ne nordeŭropanoj kaj ni entute organiziĝas laŭ niaj ideoj kaj ne laŭ la ideoj de la germanoj.

- Ĉar la aliaj esperantistoj en mia lando, krom mi, estas ĉiuj fuŝuloj, kaj mi ne volas rilati kun ili aŭ eĉ montri, ke mi konas ilin.

- Ĉar, kiam ekzistis landa asocio, oni ne nomumis min prezidanto.

- Ĉar ne estas io por fari. La batalo por Esperanto estas jam gajnita de la angla lingvo.

- Ĉar por fondi kaj mastrumi landan asocion oni bezonas monon, kaj ni ne havas monon.

Ĉar la manko de fortaj landaj asocioj kune kun aliaj sociaj faktoroj havas tre malbonan efikon je la disvastigo de Esperanto en tiu mondoparto, estas oportune laŭ

mi analizi la ĉi-suprajn asertojn unuope.

KOMUNISMO KAJ LIBERECO

Estas iom simpla kaj naiva la egaligo inter komunismo kaj mallibereco kaj kapitalismo kaj libereco. Ĉiuokaze ĝi neniel rilatas kun la vero. Neniu estas pli stalinisme organizita ol la katolika eklezio aŭ la usonaj firmaoj. Neniu estas pli organizita ol la germana ŝtato, kiu ie havas la registron de la notoj, kiujn vi ricevis en la elementa lernejo. La dosieroj de la soveta sekreta servo estis amatoraj kompare kun tio.

Se oni volas atingi rezulton en iu ajn kampo, oni devas organiziĝi, kaj ni ja volas atingi rezulton, ĉu ne? Ni volas, ke la nombro da homoj parolantaj Esperanton estu ĉiam pli alta.

Se ni ne volas, ke pli da makedonoj, bulgaroj, grekoj kaj albanoj parolu Esperanton, mi eble mistrakis mian movadon. La falo de la komunismaj reĝimoj devis porti al pli da organiziĝo je landa nivelo: rigardu la francojn aŭ la hispanojn aŭ la usonanojn. Tio ne estas detruo de la individua libereco, sed detruo de la individua anarĥiismo senefika.

GERMANOJ KAJ MALGERMANOJ

Pri io oni tre volonte ridas en Italujo, pri la germanoj. Finfine de la Meza Epoko ni estas malamikoj, kaj ili estas tiel stultaj. Ili insistas ke en ĉiuj kondiĉoj du kaj du estas kvar. Ĉe ni, la fantazi-plenaj italoj,

du kaj du povas esti ĉio, de 2 al 22 depende de la momento de la tago, de la simpatio al la kunnombranto, de la neceso trompi la impostiston, ktp.

Decidinte, ke je individua nivelo ĉiu italo estas pli inteligenta ol ĉiu unuopa germano, ni tamen ne sukcesas klarigi kial pri ĉio ili sukcesas pli bone ol ni. La germana ŝtato estas pli riĉa, la germanaj entreprenoj eksportas pli ol niaj, eĉ la germanaj horloĝoj montras ĉiuj la saman horon. La fakto estas, ke la germana organizmaniero kaj la seriozezo de la unuopaj germanoj igas ebla anoncadon de la horo, kiam la urba aŭtobuso atingos la haltejon apud via domo.

Ni demandu nin: kaj se la germanoj efektive pravus pli ol ni? Kompreneble mi multe pli ŝatas la grekan muzikon kaj la grekan etoson, kaj mi scias, ke grekoj ne povas iĝi germanoj de la vespero al la posta mateno, sed evidente ni ĉiuj sudeŭropanoj devus rekonii niajn limojn kaj komenci moviĝi al la direkto de la germana organizemo, se niaj asocioj devas efektive plenumi sian taskon: disvastigi Esperanton. Se la tasko estas io alia, ekzemple: amuziĝi, la itala organizmaniero certe estas pli bona.

MI KAJ MIAJ SAMLANDAJ FUŜULOJ

Individuismo estas la vorto. Ĉiu italo kaj ĉiu balkanano pensas pri si mem kaj volas individue solvi siajn problemojn kaj ankaŭ ĉiujn sociajn problemojn. Estas grava tio, kion mi mem faras, ne tio, kion faras miaj samlandaj kunesperantistoj. Mi verku miajn poemojn, kies belecon ili eĉ ne povas koncepti, kaj mi ne zorgu pri

tiuj stultuloj, kiuj volas malfermi kurson, dum ili apenaŭ povas instrui. Kaj cetere oni elektis s-ron Fulanon kiel prezidanton nur ĉar li kapablas zorgi pri administraĵoj, paperaĉoj kaj oni preteratentis min, la gloron de la montenegra esperantistaro.

Nu, la fakto, ke individuoj solaj sukcesis fari ion signifan, apartenas al la reĝo de la fabeloj. Kvankam ofte oni rakontas ankaŭ la historion tiel, tio ne misgvidu vin. La blanka kavaliro, kiu aperas, mortigas la drakon, kaj iĝas reĝo ne ekzistas. Ekzistas grandaj armeoj, kiuj moviĝas kune kaj atingas ion. Aleksandro la granda, estis granda, sed sen la tuta armeo, li ne estus povinta konkeri eĉ la apudan vilaĝon.

Do, la ĉefa vorto estas kunlaboro kun ĉiuj aliaj esperantistoj de la lando. Tibor Sekelj havis grandajn meritojn, kiam li sukcesis aprobigi la duan rezolucion de Unesko pri Esperanto en Sofio, sed lia plej granda merito estis la kunordigo de multaj esperantistoj, kiuj influis siajn delegitojn en Sofio. Kverelado estas natura kaj ne bezonas instigon. Kunlaboro ne estas natura kaj bezonas daŭran klopodon.

LA ANGLA, ĈU LINGVO DE LIBERECO AŬ DE SKLAVECO?

Oni iom simplisme rezonas tiel: "Usonanoj havas grandajn armilojn, belajn edzinojn kaj dikajn monujojn! Ili parolas la anglan! Eble ankaŭ mi, se mi lernas la anglan...". Bedaŭrinde la afero ne funkcias tiel. Rigardu tra la historio: kiam malriĉa lando aliĝis al riĉa lando, tio, kio okazis estis, ke la riĉuloj iĝis pli riĉaj kaj la malriĉuloj restis malriĉaj. Same funkcias pri lingvoj. Se vi lernas la anglan, usonanoj iĝos pli riĉaj, ĉar vi aĉetos iliajn librojn, rigardos iliajn filmojn, aĉetos finfine iliajn varojn, dum ili ne vere reciproke

faros la samon rilate vin. Diru al mi, de kiam bulgaroj entuziasme lernas la anglan, kiom da usonanoj komencis lerni la bulgaran kaj kiom da bulgaraj kulturaj produktoj estis senditaj al Usono?

La logiko de la plej forta estas nia vera malamiko, kaj kontraŭ tio, ne kontraŭ la angla, ni batalas. Hieraŭ estis la franca kaj morgaŭ eble estos la ĉina. Se vi estas konvinkita, ke la fortulo de la momento ĉiam pravas, vi povas rezigni pri la batalo kaj vi ne bezonas fortan landan asocion.

MONO KAJ LANDAJ ASOCIOJ

Ne, oni ne bezonas monon, almenaŭ ne multe da mono, por ekfunkciigi landan asocion. Oni bezonas ĉefe kelkajn kunlaborantajn esperantistojn, kiuj havu la klaran celon disvastigi Esperanton en sia lando. Por fari tion oni bezonas konvinkojn por sukcese konvinki la neesperantistojn kaj oni bezonas la konvinkon, ke se Esperanto ne disvastiĝas unue en Makedonujo kaj Rumanujo, ĝi neniam povos triumfi en Nova Jorko. Finfine

neniu rezignas pri siaj privilegioj volonte kaj pro amo al la homaro. Ne estis la caro, kiu donacis la vintran palacon, nek estis la reĝo de Francujo, kiu pensis skribi sur siaj flagoj "libereco, egaleco, frateco". Do, ne estos la homoj en Unuiĝintaj Nacioj, kiuj mem decidus uzi Esperanton anstataŭ uzi la anglan.

Pro tio ni bezonas vastan movadon en la tuta mondo por peti, ke oni alprenu Esperanton. Sen tiu movado eĉ la plej brila oratoro (ni pensu pri Lapenna) ne povos fari multon.

KONKLUDE

Provu starigi en via lando landan asocion, provu kolekti en ĝin ankaŭ junularan sekcion kaj instruistan sekcion. Provu kune kun la aliaj esperantistoj en via lando alparoli la neesperantistojn, ĉar tio estas la sola maniero laŭ kiu esperantista organizaĵo povas kreski nombre kaj ideo.

Estu fiera pri via laboro, ĉar vi faras ion, sur kio ĉio cetera staras. La eŭropa komisiono de UEA estas je via dispono por helpi vin.

MALLONGE

"**Informilo de Ĝemelaj Urboj**", la reta informilo de UEA, en sia n-ro 43 (decembro 2012) aperigis du artikolojn pri Kroatio: "*Letero de urbestro de Kaposvár al urbeŝtrino de Koprivnica*" kaj "*Urbeŝtrojn forte allogas la kongreso de kroataj esperantistoj*".

"**Hrvatski kajkavski kalendar 2013**" (kroata kajkava kalendaro), edonata de la filio de *Matica Hrvatska* en Ĉakovec, aperigis la tekston de **Martin Mihaldinec** "*Kongres hrvatskih esperantista u Koprivnici*" (paĝoj 258-260).

La internacia magazino "**Monato**" en sia februara numero 2013 aperigis la tekston "*Kroatio: Post prizono - manpremo*" de Josip Pleadin, rilate la liberigan verdikton al kroataj generaloj Gotovina kaj Markaĉ en Hago, kaj tiun temon elstarigis kiel la ĉefan temon sur la frontpaĝo.

EPISKOPO JOSIP ŠTROSMAJER KAJ BULGAROJ

Ljubomir Trifončovski

Episkopo Josip Štrosmajer* estis granda amiko de ni, bulgaroj. Jen nur kelkaj faktoj, kiuj tion konfirmas.

Li arde defendis la ideon pri kunigo de la katolika kaj la ortodoksa eklezioj kaj klopodis por enkonduko de la slavaj lingvoj en liturgion de la katolika eklezio. Li subtenis la bulgaran uniatan movadon en 1860aj, en kio poste la historiistoj (prave aŭ ne) vidis la ombron de la aŭstria politiko de tiu tempo fortigi rusan influon inter la bulgaroj. Li faris deklaron al la Papa Sekretario por pravigi la rusan-turkan militon de 1887/1888. En ĝi Štrosmajer forte esprimis sin kolere pri publikaĵoj en katolikaj ĵurnaloj kontraŭ Rusio, kiu komencis la militon por liberigo de Bulgario. Poste Štrosmajer pledis por Bulgario en la kadroj kontraktitaj en San Stefano.

En la jaro 1881 li diservis meson honore al la Sanktaj Cirilo kaj Metodio en slava lingvo, en la roma baziliko “Sankta Clemente”.

En la jaro 1884 li estis elektita honora membro de la Bulgara Literatura Societo (nun Bulgara Akademio de la Sciencoj).

Per la tiama bulgara ĉefministro Petko Karavelov, Episkopo Josip Štrosmajer sendis ducent florintojn al la Bulgara Ruĝa Kruco por resanigo de vunditaj bulgaraj soldatoj dum la Serbo-Bulgara Milito (1885).


Apud tiuj meritoj, certe elstaras lia mecenatemo, materia kaj morala, por la eldono de “Bulgaraj popolkantoj” de la fratoj Dimitar kaj Konstantin Miladinov, eldonita en 1861 en Zagrebo. Ne temas nur pri 70.000 groŝoj, temas pri io multe, multe pli.



La monumento al Episkopo Štrosmajer starigita en Sofio.

En 1898 Štrosmajer persone konfesis al la eminenta sciencisto prof. Ivan Ŝiŝmanov (krome li estis ne nur ministro kaj diplomato, sed ankaŭ esperantisto, i.a. honora prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio – pri li vidu en “Enciklopedio de Esperanto”), ke komence de 1860 Konstantin Miladinov sendis leteron al li el Moskvo, petante helpon por la eldono de la kolektitaj bulgaraj popolkantoj. Post la pozitiva respondo, Konstantin Miladinov veturis de Moskvo al Vieno kaj ilia unua renkonto estis en junio 1860. Dum la dua duono de 1860 Konstantin Miladinov dediĉis sin tute al la finpreparo de la popolkanto kaj en januaro 1861 la manuskripto estis jam komplete preta. Meze de la monato Miladinov kaj Štrosmajer iris de ĉakovo al Zagrebo kaj vizitis la presejon de Antun Jakić. Konstantin establiĝis en Zagrebo,

kie li plu redaktis kaj korektis la verkon. La presado finiĝis en junio 1861.



La libro de fratoj Miladinov

* Plennome kaj en originala transkripcio Josip Juraj Strossmayer.

En artikolo, kiun mi legis lastatempe, estas metitaj kelkaj interesaj demandoj: Kion sciis Ŝtrosmajer pri la bulgara popolo? Ĉu li konis la bulgaran historion kaj kulturon? Ĉu li konsciis, ke per la helpo al Konstantin Miladinov por eldoni la kolekton “Bulgaraj popolkantoj”, li fakte helpis en la batalo de la bulgaroj esti rekonita kiel sendependa nacio? Ĉu Ŝtrosmajer sciis ke Konstantino naskiĝis en Makedonio? Kaj se li sciis tion, ĉu Ŝtrosmajer akceptis, ke en tiu tempo (1860, t.e. dek jarojn antaŭ la bulgara eklezia sendependiĝo kaj la starigo de la bulgara Ekkzarko) en Makedonio ne vivas simple “makedonaj slavoj” sed ke tie loĝas bulgaroj? La vortoj de Ŝtrosmajer mem respondas: “Bulgaroj estas multnombra popolo, de kvin milionoj da homoj, kaj krome, ili meritas nian tutan atenton kaj en tio ĉar estis la unuaj sur la literatura kampo, kaj en tiu rilato ili estas ne nur unuaj inter la sudaj, sed ankaŭ inter la nordaj slavoj, en la nova tempo tiu popolo montras ke ne estas estingita la spirito de Sanktuloj Cirilo kaj Metodjo, de Klimento, de Johano Ekkzarko kaj Simeono la Granda.”

Kiam Konstantin prezentis en Vieno siajn bulgarajn popolkantojn, ili estis skribitaj

per la greka alfabeto. Ŝtrosmajer respondis: “Do mi diru, Miladinov, se vi volas ke mi eldonu la kantojn, por ĉiam vi devas forgesi la fremdajn grekajn literojn...”

Post la aresto de Konstantin Miladinov far la turkaj aŭtoritatoj en Istanbulo, Josip Ŝtrosmajer tuj engaĝiĝis por lia defendo, ĉar li vidis la realajn kialojn ke la fratoj Dimitar kaj Konstantin Miladinov estu severe persekutataj.

En aprilo 1900 grupo de lernantoj kaj instruistoj el la urbo Kjustendil vizitas Episkopon Josip Ŝtrosmajer en ĉakovo. Dum la vespermanĝo la gastoj salutis sian dommastron, kaj li respondis kun ekscita parolado, en kiu sonis ne nur propra taksado de lia partopreno en la laboro de fratoj Miladinov, sed ankaŭ lia bilanco de siaj multjaraj rilatoj kun bulgaroj kaj Bulgario: “Vi menciis mian amon kaj mian korinklinon al la frata bulgara popolo kaj elmontris kiel mi iam, kiam vi ne songis liberecon kaj savon por via popolo, ĝentile kaj engaĝige akceptis en mian domon vian gloran patrioton Miladinov, kiam li revenis el Rusio [...] kaj kiel mi ne nur aprobis ĝin sed je mia propra kosto eldonis la belan kaj gloran laboron: la poezion de la bulgara popolo. Mi faris ĝin

samtiel volonte kiel mi eldonis kaj hodiaŭ ankaŭ eldonas verkojn, kiuj fluas de la animo de mia propra popolo kaj vekas kaj plifortigas ĝian memidentecon kaj ĝian senton pri libereco kaj memdigno. Unu el la fratoj Miladinov estis ĉe mi en iu momento, kaj la dua estis en Istanbulo... Ili estis gloraj kaj indaj viroj. Ambaŭ mortis en servo por sia popolo. Mirige estas sed fakte, ke kelkfoje la plej noblaj, plej sublimaj kaj plej meritaj viroj suferas plej multe kaj mortas por la libereco kaj klerigo de sia popolo... Tial ne estas en ĉi tiu mondo pli bona kaj pli mirinda fenomeno ol tiu, kiam iu dignulo suferas pro iu sankta laboro kaj fine apogas ĝin per sia morto. Do la memoro kaj gloro de fratoj Miladinov daŭros eterne en la slavaj kaj aparte inter la bulgara popolo. Mi estas amanto, admiranto kaj defendanto de la slavaj nacioj, kaj mi nun ĝojas per mia tuta koro pro la bonstato de la frata bulgara popolo. Tamen, tute natura estas, ke mi ĉiam kaj eterne klopodas disvastigi amon, pacon kaj harmonion inter la slavaj popoloj... Ĉi tiu estus eksterordinara profito por ni kaj por la mondo.”

En la jaro 2005 Bulgario honorigis Episkopon Josip Ŝtrosmajer per monumento en Sofio, kiu situas je la strato portanta lian nomon.

AGNOSKO EN BULGARIO

Bulgara Akademio de la Sciencoj (BAS) oficiale celebris la 150-jaran datrevenon de la naskiĝo de prof. Ivan Ŝiŝmanov, la eminenta bulgara sciencisto kaj unu el la fondintoj de la Esperanto-movado en Bulgario. La inaŭguro okazis en la Solena halo de la Akademio. Enkonduke pri la agado de prof. Ŝiŝmanov parolis prof. R. Damjanova, prezidantino de la Organiza Komitato kaj gvidantino de la sci-

enca projekto “Prof. Ivan Ŝiŝmanov kaj la modernigado de la bulgara humanisma scienco“. La solenaĵon salutis altranguoj prof. E. Nikolov, la prezidanto de BAS kaj s-ino Margarita Popova, la vicprezidantino de Respubliko Bulgario, sub kies protektado estis organizita la solenaĵo, kaj prof. Bojidar Leonov, la prezidanto de AIS-Bulgario kaj de BEA, kiu transdonis al la gvidantino de la solenaĵo la jubilean medalon “D-ro

Zamenhof”, per kiu BEA honorigis la Akademion.

Sekvantan tagon, dum la jubilea Konferenco, prof. Bojidar Leonov prelegis antaŭ la akademi-anoj kaj profesoroj de bulgaraj universitatoj pri la temo “La agado de AIS-San Marino, AIS- Bulgario kaj bulgaraj esperantistoj por realigo de la ideoj de prof. Ivan Ŝiŝmanov pri la apliko de Esperanto en la internaciaj kontaktoj inter la sciencularo”.

MARE NOSTRUM / MARO NIA

✍ Radenko Milošević

Jam de pluraj jaroj, ni povus diri eĉ de jardekoj, ekzistas la ideo eldoni la poemaron titolitan "Mare nostrum / Maro nia". Temas pri antologio de elektitaj poemoj de kroataj poetoj, kies verkoj estas dediĉitaj al la "kroata maro", nome al Adriatiko. Parto de la elektitaj poemoj estas jam delonge tradukita, kaj parto el ili atendas sian vicon por tradukado. Siajn tradukajn kapabloj elprovis kelkaj tradukantoj, kaj ĉi tie ni prezentas al vi du poemojn ĉerpitajn el la estonta antologio. Vladimir Vidrić estis tre talenta poeto, sed samtempe unu el la fruperiodaj kroataj esperantistoj, kaj la poemo de Petar Preradović "Mia ŝipo" aperis sur la unua paĝo de la unua kroata Esperanto-gazeto "Kroata Esperantisto" en 1909.

PETAR PRERADOVIĆ
(1818-1872)

LA MARO

Maro bela, maro dia,
ĉie vi, la idilia,
kiel la destin'!
Al iu lulil' vi estas,
al iu la fin'.

Ĉiel' ĉie, ĉiel' ardas,
ĉiel' kie ni rigardas,
en marvasta pel',
sur ĝi blankaj papilioj
ie-tie vel'.

Kiam vent' sur vi promenas
kaj koleraj ondoj venas
furiozas duŝ',
centkapa vi 'stas leono
via fundo - buŝ'.

Vi respondas per blekego
homojn regas la timego
dum via brueg',
horor' sekvas la ondadon
la puŝojn fulmeg'.

*Tradukis el la kroata:
Josip Pleadin*

VLADIMIR VIDRIĆ
(1875-1909)

EN LA NUBOJ

Super mar' mi estis, sur la nuba punto
Kie ŝtonkolonoj la ĉielon tenis,
Al dio Zeŭso kapkline mi venis
Kun liro el Tebo kaj laŭr' sur frunto.

Kaj Zeŭs' diego, distre tie kuŝis.
Lia brusto larĝa sub la vest' nudiĝis,
Blankis liaj haroj. Dum parol' elbuŝis
Lia kap' enorma pro dolor' kliniĝis.

Li mantelon sian kuntiris kaj diris:
"Disflugas la birdoj tra liber' ĉiela,
Vi kiu la maron kaj ĉielon miris
Al kiu survangas la radio hela;

Kaj vi kiu revas pri belnuda ino
Sur ondo lazura naskiĝinta bene,
Alveninte teren, en ombro de poplo
La plugilon prenu, plugu sulkon pene.

Kiam ŝvito gutos de sur via frunto
Sub nuboj de sama ĉiela fontano
Min vi neos tiam pro sufer' kaj pano."
- Super mar' mi estis, sur la nuba punto.

Tradukis el la kroata: Josip Pleadin



AŬGUSTORAKONTO EL STOKHOLMO

 Kerstin Rohdin

Ankoraŭ restas la varmetaj ventoj dumtage kaj vespere milda temperaturo ĉirkaŭas min.

Kiel ofte mi ĝojas ke mi loĝas ĝuste en tiu ĉi loko, meze inter arbaro kaj ĉefurbo kun multaj travivaĵoj. Ĉirkaŭ la tuto estas akvo, estas lagoj, estas maro kun ondoj. Duonhora promenado piede kaj vi atingas arbaran lagon kiel okulo brilanta per la sunradioj. Trikilometra promenado gvidas vin al vilaĝo ĉirkaŭita de granda praarbaro. Duonhora per buso portos vin al Stockholmo, kie vi povas vidi malnovajn kaj novajn domojn. Rigadu supren laŭ la muroj kaj vidu la ornamaĵojn. Vidu la diversajn kolorojn, flavan, ruĝetan, verdetan, brunetan. Trovu vian vojon inter la mallarĝaj stratoj en la Malnova Urbo, la komenco kaj koro de la urbo, kiu kreskas ĝis du milionoj da enloĝantoj.

Apude estas Riddarholmen, kie dum la 13-a jarcento la monaĥoj ekloĝis kaj helpis al la homoj sin kuraci kaj kreskigi sanigajn plantojn. Ili konstruis sian monaĥejon kie antaŭe la bestoj sin nutris. En la 16-a jarcento la monaĥoj estis forpuŝitaj ĉar la reĝo decidis ke la lando estu protestanta, do for ĉiuj monaĥoj. En la 17-a jarcento, kiam la urbo kaj la regno kreskis, oni konstruis grandajn domojn kaj kastelojn sur la ne tre granda insulo. Tie mi promenas inter la belaj domoj sur la granda placo de Birger Jarl.

Baldaŭ mi atingas la randon de la klifo kaj malfermiĝas antaŭ miaj okuloj granda akvosurfaco de Lago Mälaren. Blankaj boatoj glitas sur la sunoplana

surfaco. Fone Essingepono fermas la bildon. En kafejo sub tilioj vi povas longe sidi kaj ĝui la naturon kaj trinki vian bieron. Paro de apuda tablo foriras neforpreninte la tasojn kaj pecon da bulko. Tuj venas la mevoj kaj formanĝas la restaĵojn, la glasoj kaj la bierskatoloj falas teren. Multaj vitreroj de la rompita glaso. La homoj restas senmovaj ĝuante la vastan vidaĵon.

Mi sidas apud Riddarholmspreĝejo en kiu la svedaj reĝoj estas entombigitaj. Ekde la filo de Birger Jarl, kiu fondis Stockholmo. La defendaĵo de la urbo estis farita de trunkoj (stockar) kaj ĝi situis sur insuleto (holm). Mi ekpromenis ĉirkaŭ la Parlamentejo, laŭ la Reĝina Strato, kiu nun estas piedirejo kaj plena de butikoj kaj restoracioj apud la strato kaj sur la strato. La restoraciestroj devenas de plej diversaj landoj por gustumigi al ni siajn manĝospecialaĵojn. Eĉ de Mongolio. Mi trovis belajn malmultekostajn kartojn, En Reĝina Strato oni ĉiam havas malmultekostajn kartojn. Mi eniras librovendejon kaj vidas la novajn librojn de la aŭtuno. Jam iom alfluas la "librorivero de la jaro". Mi trovis kelkajn de svedaj verkistoj. Nun multaj libroj estas speco de biografioj aŭ biografiromanoj pri historiaj personoj aŭ de iu el la familio de la verkisto. Do ekzistas interesa legaĵo por la vintro. Mi provas vivi tiamaniere ke mi ĉiun tagon lernu ion novan. Ion kion mi travivas, aŭ legas, aŭ vidas aŭ aŭdas. Mi daŭrigas mian promenadon al la preĝejo de Adolf Fredrik. Survoje mi pasas la ruĝan preĝejon de Jakob kaj la Operejon, kiun konstruigis nia reĝo Gustav la Tria, nia "kultureĝo"

De ĉiu punkto mi vidas multajn el la preĝejoj de la urbo. Mi lernadas rekonni ilin, ĉar mi ne loĝis tre longe tie ĉi. En la tombejo ĉirkaŭ Adolf Fredrik preĝejo estas entombigita la unua socialdemokrata ĉefministro Hjalmar Branting kaj la eble plej konata ĉefministro Olof Palme. Mi sidigas sur benko en la tombejo legante libron pri tio kiel vivis la homoj kaj Jesuo je la komenco de nia epoko en la jaro 0. La libro temas pri la vivo de Jesuo tra modernaj okuloj. Ĝi volas historie montri kia estis la vivo en Palestino en tiu tempo.

Post duonhora mi eniros la preĝejon kiu estas konstruita fine de la 18-a jarcento. Ĝi estas en formo de baziliko kun kvar branĉoj kaj kupolo kun pentraĵoj el diversaj partoj de la Regno de Dio. Ofte mi vizitas koncertojn en preĝejoj. Tiun ĉi semajnon prezentas sin junaj muzikistoj naskitaj en la 1980-aj jaroj. Ili lernis en diversaj renomaj muzikaltlernejoj diversloke en Eŭropo.

Hodiaŭ Maria Grönhaug prezentas César Frank, Georg Böhm, Johann Sebastian Bach, Kenneth Leighton Paean. Tiun lastan mi tre ŝatis.

Mi volas en mia menso kolekti belajn travivaĵojn de muziko, legaĵo, bildoj, eventoj, interesaj interparoloj kun homoj por havi tian trezoron kiam mi fariĝos pli maljuna kaj bezonos repensi pri bonaj eventoj por kapabli vivi dum mia lasta tempo. Pro tio mi volas travivi bonajn aferojn, vidi belajn aĵojn, aŭskulti belan muzikon, kaj lerni ion novan, interesan ĉiun tagon. La akvo de maro/lago estas por mi tre grava.

Kun la muziko ankoraŭ en mia cerbo mi iras al la Metroo kaj post 45 minutoj mi estos hejme. Dankon ke vi kuniris kun mi dum bela aŭtuna tago!

EPOKFARA EVENTO - *Malgosia Komarnicka* ESPERANTO EN POLA SENATO

La 17-an de oktobro 2012 en la supera pola parlamenta ĉambro t.e. en Senato okazis solenaĵo okaze de la 125-jariĝo de Esperanto. La solenaĵon preparis la pola asocio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE-PL) kunlabore kun japana filantropo, mecenato kaj entreprenisto **Etsuo Miyoshi**. La dato estis speciale elektita. En tiu tago estis planitaj kunsidoj de ambaŭ parlamentaj ĉambroj – Senato kaj Sejmo. Bedaŭrinde, pro politikaj kialoj la kunsido de Sejmo okazis kelkajn tagojn pli frue kaj tial plimulto da parlamentanoj ne povis ĉeesti la solenaĵon.

Dum la tago okazis tri sinsekvaj eventoj:

Je la 11h00 okazis la unua fonda kunsido de la Parlamenta Grupo por Subteno de Esperanto.

Je la 14h00 vicmarŝalo t.e. vicprezidanto de Senato **Jan Wyrowiński** oficiale malfermis la ekspozicion pri Esperanto. Li substrekis, ke la ideo de Esperanto venis al Ludoviko Zamenhof pro la multkultureco de Bjalistoko en kiu li naskiĝis.

La ekspozicion honorigis per sia alveno ankaŭ **Wanda Nowicka**, la vicprezidantino de Sejmo kaj **Maria Pończyk-Pozdziej**, la vicprezidantino de Senato. **Wanda Nowicka** esprimis sian kontenton, ke Esperanto konstante evoluas. **Maria Pończyk-Pozdziej** menciis, ke ŝia patro estis esperantisto, sed li mortis kiam ŝi estis infano kaj ŝi pro manko de tempo ne lernis Esperanton.

La ekspozicio konsistis el 21 aŭtoĵoj kaj 6 vitrinoj. Sur la aŭtoĵoj, kiuj estis tiel planitaj, ke oni povis rapide legi la enhavon, estis prezentita historio kaj atingoj de Esperanto. En la vitrinoj vizitantoj

povis admiri Esperantajn librojn, lernolibrojn, la originalajn leterojn kaj poŝtkartojn persone skribitaj de **Ludoviko Zamenhof**, la Unuan Lernolibron, kelkajn ZEO-ojn.

La ekspozicion en tiu tre prestiĝa loko oni povas viziti ĝis la 29-a de oktobro 2012. Poste la ekspozicio estos prezentata en Warszawska Szkoła Zarządzania - Szkoła Wyższa kaj sekve veturos al alia pola urbo.

Je la 15h00 komenciĝis la konferenco, “125 jaroj de Esperanto”. Ĝi daŭris preskaŭ 3 horojn. Ĉiujn ĉeestantojn denove bonvenigis la vicprezidanto de Senato, **Jan Wyrowiński**, kiu transdonis gvidadon de la konferenco al **Malgosia Komarnicka**.

Prelegis kvar prelegantoj, kiuj emfazis, ke Esperanto estas garantio konservi kulturalan diversecon de Eŭropo kaj samtempe kaŭzi ĝian integriĝon.

Sean O Riain, la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) ne povis partopreni la konferencon, do lia prelego estis voĉe legita. Li proponis, ke la pola registaro subtenu peton pri duoficiala statuso por Esperanto en EU.

Etsuo Miyoshi, honora prezidanto de Korporacio Swany akcentis utiligon de eŭropa kultura heredaĵo - kiu estas Esperanto, ĉar tio alportos investojn kaj multajn turistojn al Pollando.

Kazimierz Krzyżak, estrarano de EDE-PL en sia parolado montris la koston kiam pagas ĉiu ano de Eŭropa Unio por lernado de fremdaj lingvoj. Jare tio estas 350 miliardoj da eŭroj, kio signifas 3,2% de la Malneta Enlanda Produkto de EU. Tiuj kostoj ne

portas tamen britoj, ĉar malmultaj el ili lernas fremdajn lingvojn.

Profesoro **Witold Stępniewski**, prezidanto de Lublina Filio de PEA, prezentis la malfacilan situacion en la Eŭropuniaj instancoj - 27 landoj kaj 23 oficialaj lingvoj signifas 506 traduktraktajn. Li substrekis, ke la dominado de la angla lingvo kontraŭas la principon pri lingva egaleco.

Dum komuna diskuto parlamentano **Tadeusz Iwiński** atentigis, ke oni ne povas dubigi la rolon de la angla, ĉar disvastigo de Esperanto opozicie al aliaj lingvoj ne alportos rezultojn. Li ankaŭ opinis, ke malfortaĵo de Esperanto rezultas el tio, ke neniu ŝtato nek internacia organizo subtenas ĝin. Laŭ li grava tasko nun estas klopodi revenigi la Esperanto-disaŭdiĝojn de Pola Radio.

Stanisław Rynduch substrekis, ke la dominado de la angla estas tro granda en Pollando. Multe da polaj infanoj ne konas polajn kristnaskajn kantojn, sed nur usonajn, anglalingvajn. Li ankaŭ rememorigis, ke post la falo de la “muro” finiĝis la dominado de la rusa lingvo. La angla perdos sian gravecon kiam finiĝos dominado de anglalingvaj landoj.

Roman Dobrzyński memorigis, ke en la pasinteco poloj estis devigitaj uzi la rusan lingvon. Hodiaŭ havante sendependan landon ili senpense akceptas novan koloniadon: anglalingvajn ŝildojn.

La senatano **Edmund Wittbrodt** konkludis la konferencon. Li rimarkis, ke la ideo uzi ĉiujn lingvojn en Eŭropa Unio kaŭzas la grandegan komplikecon, do en iu momento la sistemo ĉesos funkcii pro ekonomiaj kialoj. La



ĉi-jara solena 125-a datreveno de apero de Esperanto kaj ekesto de Parlamenta Grupo por Subteno de Esperanto povas kaŭzi revivigon de interesiĝo pri Esperanto. Li ankaŭ avertis esperantistojn kaj adeptojn de Esperanto, ke ili prezentu Esperanton kiel kompletigon de la angla lingvo kaj ne opozicie al ĝi. Pli bone estas montri profitojn, kiujn donas lernado de Esperanto ol montri minusojn de la angla. Profesoro **Edmund Wittbrodt** proponis ankaŭ subteni la instruadon de Esperanto.

La konferencon partoprenis pluraj parlamentanoj, reprezentantoj de Esperanto-movado, reprezentantoj de scienca kaj kultura medioj kaj ankaŭ ĵurnalistoj.

Post la konferenco okazis festa

vespermanĝo, kiun ĉeestis invititaj esperantistoj kaj politikistoj. Ili daŭrigis interparoladon pri Esperanto tuŝante diversajn temojn por kiuj mankis la tempo dum la konferenco.

La unuan fojon en la kelkcentjara historio de Pola Parlamento la tuta tago estis dediĉita al Esperanto. La eventon honorigis gravaj personoj. Tio estas grandega sukceso de **Etsuo Miyoshi** kaj EDE-PL kaj por ni, ĉiuj esperantistoj la kaŭzo de granda fiero.

La 17-an de oktobro 2012 en grava loko por ĉiu polo okazis la epokfara evento kaj nun, nur de ni dependas ĉu tiun sukceson ni saĝe eluzos.

**PRELEGO EN LA
PORINSTRUISTA
AKADEMIO
EN PETRINJA**

La 24-an de januaro en Porinstruista akademio en Petrinja, la Esperanto-societo Petrinja kune kun Kroata Esperanto-Ligo organizis prelegon "Hlapić en Azio". Antaŭ sesdeko da studentoj kaj la vicdekano prelegis **Spomenka Ŝtimec**. La ĉeestintojn salutis **Nataša Dorosulić**, la vicprezidantino de Esperanto-societo Petrinja. Distribuitaj estis aliĝiloj por Esperanto-kurso komenciĝonta la 5-an de marto.

BONA PAĈJO KAJ MALBONA PANJO

✍ Emilija Obradović

La patrino tiutage estis pli laca ol kutime. La taskojn en sia laborloko ŝi devis plenumi konsciencie kaj orde, kaj ankaŭ hejme atendis ŝin multnombraj taskoj.

Ŝi devis kontroli ankaŭ hejman taskon de la okjara filo, trafoliumi malnovajn lernolibrojn kaj ilustritajn materialojn por trovi fotojn de folifalaj kaj ĉiamverdaj arboj por glui ilin en la kajero de studobjekto "Naturo kaj socio" kiel hejman taskon.

Nervozo kaj laco kreskadis en la patrino ĝis kulmino, kaj do ne estis miraklo, ke je la 20h00 ŝi energie postulis, ke la filo iru ripozi.

Tiam komenciĝis la fila kajolado: "Panjo, mi petas, permesu ke mi rigardu televidan elsendon "Podgora 72".

La panjo restis ĉe sia decido, ĉar ŝi opiniis, ke per la fila

enlitiĝo finiĝos ankaŭ unu ŝia tasko.

Intertempe enmiksiĝis ankaj la "bona" paĉjo, kaj la fila enlitiĝo esktrime komplikiĝis.

La filo fakte foriris en la liton, sed kun helpokriado kaj plorado:

"Pa-ĉjo, pa-ĉje-to, venu!"

La "paĉjeto" eksplikadis al la patrino, ke ŝi ne scias rilati al la infano, ke ilia dorlotato havas talenton pri pentrado, ke li tre volonte desegnas batalantojn, kanonojn kaj batalojn, kaj ke tiu filmo tre ĝojigus lin. La patrino obstine restis ĉe sia decido.

"Pa-ĉjo, pa-ĉje-to, venu!", pluvokis la filo, per ankoraŭ pli forta ĉantaĝa plorado, ĉar se ne cedos la patrino, certe cedos la patro.

Kaj, nature, kio ja estis atendebla, je la patra invito la filo timeme entiris sin en la ĉambron kaj sidiĝis antaŭ la televida ekrano.

Post la fino de la elsendo

la filo kisis la patron, diris: "Bonan nokton, paĉjo!" kaj foriris en sian ĉambron.

La patrino ĉion ĉi rigardis sen komento kaj silentis.

Je ĉi tiu ekzemlo, da kiaj en niaj familioj ĉiutage estas sennombo, ni povas vidi multajn erarojn. La patrino estis laca kaj ekscitita, sekve ankaŭ tro severa en sia insistado. Kaj la bona paĉjo? Ĉu li korekte agis? Ne! Malgraŭ la sciigo, ke la edzino troigis, li devis formale subteni ŝin, kaj poste kun ŝi interparoli. Tiukaze la okjarulo sen larmoj komprenus, ke la gepatra decido estis unuanima, kaj sekvus: "Bonan nokton, paĉjo kaj panjo!"

Kaj la filo? La filo ellernis kiel li povas kontentigi siajn dezirojn per ploraktorado.

Sekve, temas pri unu eduka epizodo kaj - tri eraroj.

Tradukis la aŭtorino



La teksto realigita per helpo de Milica Ježovita kaj Turisma Asocio de Križevci

Križevci estas unu el la plej malnovaj mezepokaj urboj de norda Kroatio, menciita jam en la jaro 1193 en la dokumentoj de la reĝo **Béla la Tria** kiel Cris (Kruco), komence dividita je Supra kaj Malsupra urboj. Ekde la jaro 1252 ĝia Supra urbo ricevis la privilegion de libera kaj reĝa urbo, kion nuntempe oni festas kiel Tagon de la urbo. La Malsupra urbo ricevis la privilegion kun la rajto starigi la urbajn remparojn en 1405. Konfliktoj inter la du urboj daŭris ĝis la jaro 1752, kiam unuigis ilin la imperiestrino **Maria Theresia**. La unuigita urbo Križevci ekde tiam posedas sian blazonon kiu, kun kelkaj plisimpligoj, estas uzata ankaŭ nuntempe.

Križevci ekde pratempo estis administra centro de la regiono, kaj ĝia graveco kreskis ekde kiam en ĝi komencis okazadi kroataj ŝtataj parlamentkunsidoj. El la trideko da



EKKONU KROATION

Križevci

tiaj kunsidoj, la plej konata okazis en 1397, kiam la reĝo **Sigismundo** trompis kaj ordonis mortigi la kroatan banuson **Stjepan Lacković** kaj liajn adeptojn. Ĝi restis konata kiel "Sanga parlamentkunsido de Križevci".

Veliko križevačko spravišće (la granda foiro de Križevci) estas tradicia popola festo kaj tritaga kultura-historia manifestacio, kiu sian fundamenton havas en la legendo el la 14-a jarcento, parolanta pri interpaciĝo de la burĝaro de Križevci, kun la "prunistoj" de Kalnik, kaj en la "**Statutoj de Križevci**", la populara vinceremonio kaj la unuaj skribitaj reguloj pri belkonduco en bona societo kaj apud abunda manĝotablo.

Laŭ la menciita legendo, la reĝo **Béla la Kvara**, fuĝante antaŭ tataroj, trovis rifuĝon en la nekonkerebla ŝtona fortikaĵo de Veliki Kalnik. Tataroj iom poste

atingis la fortikaĵon. Kvankam ne sciante ke en ĝi troviĝas la reĝo, ili sieĝis la fortikaĵon, por devigi la defendantojn kapitulaci. La legendo rakontas jene:

"En la mallumo dum noktaj horoj, kiam la mongolaj gardistoj dormetis kaj reduktis sian atenton, iaj homfguroj kun branĉoj surdorse, aliradis la muregojn de la fortikaĵo.

Je ĝenerala surprizo de la defendantoj, kiuj ĉion ĉi observis el la altaj turoj, atendante ian novan tataran trompon, la remparojn alflugis prunbranĉoj plenaj je fruktoj. Tiam ili komprenis, ke la popolo nutras, subtenas kaj helpas ilin. Tio ripetigis plurfoje. La sukoplenaj prunoj redonis al ili la forton kaj batalkurakon. Pro tio la tataroj rezignis pri plua sieĝado kaj ekvojis al Adriatiko, persekutante la region.

Kiam la mongoloj malvenkis en la kampo de Grobnik, honore al tiu venko, sed ankaŭ pro la danko, la reĝo Béla la Kvara, proklamis la loĝantojn de la regiono ĉe Kalnik - nobeloj, kaj baldaŭ iliaj ĵaluzuloj, aparte la burĝoj de Križevci, moke nomis ilin "nobeloj-prunistoj".

Križevci havas ankaŭ sian sanktulon, la **Sanktan Marko de Križevci**. Li naskiĝis en Križevci en la 16-a jarcento, studis en Graz kaj Romo, kaj poste estis kanoniko en la diocezo de Esztergom, kaj profesoro kaj estro de la seminario en Trnava (Slovakio). Kune kun jezuitoj **Pongracz** kaj **Grodziecky** li zorgis pri la katolikoj en tiu urbo, kio furiozigis la kalvinistojn. Ili estis malliberigitaj, torturitaj kaj





ekzekutitaj en Košice en 1619. En la jaro 1995 ili estis proklamitaj sanktuloj. **Sankta Marko de Križevci** estas la tria kroata sanktulo.

La ĉi-tie aluditaj "Statutoj de Križevci" menciigas ekde la 18-a jarcento, kaj sen ili la vera amuziĝo kaj festeno estis apenaŭ imagebla. Laŭ la reguloj de la "Statutoj", en ĉiu societo oni devas fari tri tostojn: "toston al la patrujo, amikaro kaj pli bela sekso", kaj ĉe la tostado estis uzita malnova, "bunta" parolmaniero. La Statutoj de Križevci porparolas unue gajon kaj ĝojon en bona societo, kie vastiĝas amikeco kaj bonaj interhomaj rilatoj, sed strikte atentigas ke la konsumado de vino kaj fortaj alkoholaĵoj estu farata prudente, ĉar ĉio farata supermezure, estas bona nek por unuopulo, nek por la socio.

Ujo aŭ glaso el kiu oni trinkis tostante ĉe alveno al ies domo, nomiĝas "bilikum" (duobla tostkruĉo). Trinkado el tostkruĉo estas grava ago, tuj notata en la hejma protokolo, taglibro pri domamikoj,

datumoj pri vinberrikolto, mosto, vino kaj aliaj aferoj. Domprotokolo estis la plej grava libro en ĉiu domo, konservata en speciala loko, kutime ŝlosita.

En Križevci funkcias ankaŭ la sola historia virina trupunuo en la mondo, havanta siajn radikojn en la jaro 1848, kiam la banuson Josip Jelačić, dum lia vojaĝo tra Križevci, protektis la fraŭlina gvardio konsistanta el patriotinoj de Križevci.

Križevci posedas ok

preĝejajn turojn, sekve 8 gravajn religiajn konstruaĵojn: la preĝejon de sankta Ana (konstruita en 1665, ekde 1786 ĝi estas paroka preĝejo), preĝejon de sankta Kruco (menciata ekde 1232, kaj servinta kiel paroka preĝejo ĝis 1786), grekokatolikan katedralon de Sankta Triunuo (sidejo de grekokatolika diocezo en Kroatio), parokan preĝejo de Beata Virgulino Maria la Malgaja kaj de Sankta Marko de Križevci (fondita en 1775), kapelon de Sankta Marko de Križevci (el la 17-a jarcento), kapelon de Sankta Floriano (el 1735), kapelon de Sankta Roko (el 1694) kaj kapelon de Sankta Savo (el 1904).

Vidindajoj en la proksimeco de Križevci estas multaj, sed ni elstarigu la vilaĝon kaj monton Kalnik, kiu estas protektita naturpejzaĝo kun la plej alta pinto de 643 metroj. Sur ĝiaj rokkrestoj troviĝas la mezepoka fortikaĵo Malnova urbo Granda Kalnik, kaj multaj montgrimpaj padoj, kaj montgrimpa domo



DONACKONTRAKTO FAVORE AL DEC

Dum la Zamenhoftaga festo en Bjelovar, la reprezentantoj de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac (DEC) subskribis donackontrakton favore al modernigo de la oficeja ilaro de DEC. Ekde sia fondiĝo en 2007, UZE senĉese subtenas la laboron de DEC konsiderante ĝin grava institucio de la kroata Esperanto-movado. La plej grava celo de DEC estas okupiĝi pri arkivado kaj dokumentado de Esperanta laboro en Kroatio, sekve esti nacia Esperanto-arkivo, sed ne malpli grava estas ankaŭ ĝia organiza laboro (ni rememoru la organizadon de la 9-a kaj 10-a kongresoj de kroataj esperantistoj en Bjelovar kaj Koprivnica, fondon de societoj en Bjelovar kaj Križevci, starigon de memortabulo al Ilija Puhalo en Koprivnički Bregi, gvidadon de kursoj diversloke, starigon de pluraj ekspozicioj, realigon de televidaj elsendoj ktp). Oficiale DEC fondiĝis en 2010, sed UZE partoprenis aktive la kampanjon por ĝia fondo kaj financa prizorgo jam en 2008. Jam delonge sentebliis la neceso havigi por DEC bonkvalitan fotokopilon, kaj UZE decidis donaci la necesan sumon de preskaŭ 1000 eŭroj por ĝia aĉeto. La afero estis publike konigita en Bjelovar, kaj la 9-an de januaro 2013 DEC ricevis la novan plurfunkcian maŝinon Canon iR2520 konektitan al novaĉetita Toshiba-komputilo.



Okaze de la centjariĝo de la naskiĝo de Tibor Sekelj la urba Esperanto-societo "La Mondo" kaj Popola Biblioteko en Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), preparis la 10-an de decembro 2012 prelegon pri la vivo kaj agado de Tibor Sekelj. Prelegis la sekretario de Eŭropa Esperanto-Unio Zlatko Tišljar.

La saman vesperon Mićo Vrhovac, vicprezidanto de la Esperanto-societo "La Mondo" malfermis porokazan ekspozicion de libroj kaj gazetoj pri Tibor Sekelj.

Pri la evento raportis la junulara elektronika gazeto @ TRAFIKA kaj la tutlanda taggazeto *Nezavisne novine*.

PRELEGO PRI TIBOR SEKELJ EN BANJA LUKA

 Mićo Vrhovac



Esperanto-societo "Estonteco" Križevci okazigis sian jarkunvenon la 10-an de januaro.

Bjelovara Esperantista Societo petis finacan subtenon en la konkurso de Urbo Bjelovar por sia projekto "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo". La programo estas

planata por Tago de la urbo, (inter la 21-a kaj 23-a de septembro 2013).

La Kulturdomo de Gresillon organizas sian trian PRINTEM-PAN SEMAJNON de la 20-a ĝis 27-a de aprilo 2013 kunlabore kun ILEI. Informiĝu ĉe: gresillon.org/printempo Profitu reduktion de 10%

por aliĝo ĝis la 20-a de februaro: <http://gresillon.org/aligho> Fine de la kursoj, vi povas trapasi internacian KER-ekzamenon en 3 niveloj. Ĉi-jare, oni organizas seminarion, post la ekzamenoj, de la 27-a de aprilo ĝis 1-a de majo kun la sekretario de ILEI Radojica Petrović, kiu venos el Serbio kaj proponas studi pri interkultura komunikado.



ESPERANTISTO DE LA JARO 2012

Peter Baláž, 33-jara slovaka esperantisto, kunordiganto de la asocio Edukado@Interreto (E@I) estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2012 pro starigo, evoluigo kaj prizorgo de gravaj retaj projektoj; modela



kunlaboro kun landaj kaj Eŭropaj instancoj; okazigo de la Somera Esperanto-Lernejo kaj de la scienca konferenco KAEST; eldono de gravaj diskoj, libroj, broŝuroj kaj filmoj en/pri Esperanto; kaj pro tio, ke li sukcesas stimuli kaj (re)aktivigi multajn talentajn gejunulojn, kiuj sen tio eble perdis intereson pri Esperanto.

(Laŭ "La Balta Ondo")

POEMARO DE DIMITRIJE JANIČIĆ

La beograda esperantisto, redaktoro de "Beograda Verda Stelo", Dimitrije Diso Janičić, verkas originalajn poemojn en Esperanto, kaj premiigis plurfoje en diversaj poeziaj konkursoj. En 2012 li fine decidis eldoni sian propran libroforman poemaron, kiun li



titolis "Maturaj meditadoj". La 112-paĝa, fortike bindita kaj bele presita libro, enhavas krom la poemojn de la Janičić, ankaŭ poemojn kaj prozajojn de liaj gastantaj amikoj el pluraj landoj. Aĉetebla ĉe UEA kontraŭ 12,90 eŭroj.



BET-49 OKAZOS EN UTENA

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni la tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET), kiuj por la 49-a fojo okazos en orientlitovia urbo Utena (35.000 loĝantoj). BET-49 okazos inter la 6-a kaj 11-a de julio 2013 en la moderna kaj bone ekipita Kolegio de Utena. Celoj kaj taskoj de BET-49 estas: studi problemojn de la Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn

ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi spertojn pri esperantista laboro, perfektigi en Esperanto, enhavriĉe pasigi la tempon. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

La loĝado en BET-49 estas organizita en du- kaj trilitaj ĉambroj de Studenta domo de la Kolegio, en speciale bone ekipitaj gastejoj de la Kolegio aŭ en urbaj gastejoj kaj hoteloj. Matenmanĝoj organizotaj en la bufedo de Studenta domo, tagmanĝoj en la domo de Kolegio, vespermanĝoj libervole en urbaj kafejoj kaj restoracioj. La programo estas tradicio, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de la Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo,

scienteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vindindaĵoj, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, diservo, baza konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero k.a..

Detalajn informojn pri la aranĝo kaj aliĝilon vi povas trovi ĉe: <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET49>

Aliĝ- kaj kontaktadreso: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 kaj +370-686-69875. Faksilo estas: +370-37-228616. Retadreso de LEA estas: litova.ea@mail.lt ; pjedorovas@takas.lt kaj irenaa@takas.lt

FORPISIS ADEM JAKUPOVIĆ (1944-2013)

La 19-an de januaro 2013, forpasis ADEM JAKUPOVIĆ, diplomita elektroteknika inĝeniero, tradukisto kaj verkisto, la filo de geesperantistoj Mehmed kaj Evica Jakupović (iama gravaj aktivuloj en Rijeka). Li naskiĝis la 21-an de novembro 1944 en Zemun, finstudis la Elektroteknikan fakultaton en Beogrado (1970) kaj laboris en “Dunav-osiguranje”, kiel specialisto pri komputiloj dum pli ol 30 jaroj. Li tradukis ĉirkaŭ 20 prikomputilajn librojn el la angla, germana kaj itala lingvoj en la serban. Aŭtoro aŭ kunaŭtoro de 11 komputilaj libroj. Li parolis la anglan, germanan, italan kaj Esperanton, kaj pasive konis la hispanan. Esperantistiĝis en 1957, trapasis ekzamenojn A (1958), B (1963), C (1965) kaj estis membro de Esperanto-societo Zemun, ĝia



komtiano kaj prezidanto. Membro kaj komitatano de Esperanto-societo “Radomri Klajić” en Beogrado, membro de la LKK de UK en Beogrado (1973), membro de Esperanto-instituto de Serbia Esperanto-Ligo. Li estis teknika redaktoro de la “Antologio de serba poezio 1200-2000”. Partopreninto

de Esperanto-laborbrigado en 1959 en Maloŝište apud Niš.

Laste li estis prezidanto de la reformita Serbia Esperanto-Ligo kaj unu el la plej gravaj membroj de la novfondita Esperanto-societo “Nova Sento” en Beogrado, unu el la membroj klopodantaj akiri propran ejon por esperantistoj en Beogrado.

Kroataj esperantistoj renkontis lin en la landaj Esperanto-kongresoj en Bjelovar, kaj laste pasintjare en Koprivnica.

Li estis silentema homo, sed tamen multon faranta. Multaj kroatoj ne scias, ke li estis la ĉefa merito en la malkovro de la nepino de kroata Esperanto-pioniro Fran Kolar. Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac perdis valoran kunlaboranton kiu ofte akiradis tre gravajn informojn. Por serbia Esperanto-movado lia forpaso estas netakseble grava perdo, ĉar li apartenis al grupo de plej kapablaj nuntempaj aktivuloj en Serbio.

La malgaja statistiko pri forpasoj de kroataj esperantistoj, montras, ke en 2011 kaj 2012, krom la antaŭe nekrologe menciitaj sur la paĝoj de "Zagreba Esperantisto", forpasis ankaŭ la jenaj:

Vjera Baletić (Cerna, la 6-an de oktobro 1928 - Rijeka, printempe de 2012). Instruistino de geografia kaj historio. Esperantistiĝis en 1950 en Zagrebo. Multjara delegito de UEA en Opatija kaj fakdelegito pri historio kaj geografio. Membrino de Esperanto-societo Rijeka.

Janja Dotlić (Ostrovica, la 19-an de oktobro 1935 - Kastav, la 21-an de januaro 2011). Profesorino pri literaturo. Esperantistiĝis en Koprivnica en 1950, estis membrino de “La Adriatika Stelo” en Pula ekde 1964 kaj poste de Esperanto-societo Rijeka.

Đuro Kalačić (Ćilipi, la 26-an de decembro 1906 - Njivice, printempe de 2011). La plej aĝa kroata esperantisto, aŭtomekanikisto, kiu laboris en pluraj profesioj. Esperantisto ekde 1924. Membro de Esperanto-societoj en Zemun kaj Rijeka.

Damir Rak (1961-2011). Instruisto kaj defektologo. Esperantistiĝis en 1979 en Rijeka kaj estis membro kaj estrarano de loka societo en Rijeka. Kunfondinto de la societa gazeto “Heliko” kaj ĝia ĉefredaktoro.

Stephanie Strunjak (1990-2012). Studentino de filozofio en Zagrebo, kiu sian famon en Esperanto akiris per sukceson en la finnlanda konkurso “Fabelo Interncia”. Pereis aŭtoakcidente la 11-an de februaro 2012 en Zagrebo.

Draško Toplak (Varaždin, la 2-an de aprilo 1937 - Zagrebo, la 29-an de aŭgusto

2012). Pentristo kaj instruisto de pentroarto. Ilustris librojn de sia bofratino, la Esperanta verkistino Zora Heide.

Marčelo Trampuh (Kaštelir, la 21-an de septembro 1951 - Kaštelir, la 26-an de majo 2011). Ekonomikisto en turismo kaj hotelismo. Esperantistiĝis en Rijeka en 1970 kaj estis membro de loka Esperanto-societo.

Enrichietta Valeri (Praga, 1922 - Rijeka, la 17-an de junio 2011). Instruistino pri la lingvoj itala kaj angla. Esperantistino ekde 1963, membrino de Esperanto-societo Rijeka.

Zlatko Vukelić (Krm-pote, la 13-an de novembro 1938 - Kastav, julio de 2011). Fizioterapiisto. Esperantistiĝis en Zagrebo en 1952. Membro de Esperanto-societo Rijeka kaj de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj.



Mi legis, ke la gazeto "Zagreba esperantisto" eldonata de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE), antaŭ kelkaj tagoj eldonis sian 20-an numeron. Mi rigardis ĝin en la reto kaj mi trovis ĝin tre bone redaktita. Gratulojn al vi!

Renato Corsetti,
(Palestrina, Italujo)

Dankon pro la bela gazeto "Zagreba Esperantisto" kaj multaj enhavoriĉaj artikoloj en la numeroj 6/2011 kaj 1/2012. Tre interesaj estas "Tri kubetoj da sukero", "Sun-sistemoj kaj planedoj ĉirkaŭ foraj steloj", "La Kristnaska stelo", la intervjuo kun mia amiko Géza Kurucz kiu multe kontribuis al "Juna Amiko", la artikolo pri Vida Jerman ... Je mia surprizo ankaŭ Ho Song aperis. Li estas mia konato, kaj dank' al mia perado, li sukcesis okazigi sian ekspozicion en Japanio.

Hori Jasuo (Japanio)

Hodiaŭ kun multa ĝojo ni ricevis la gravan revuon "Zagreba Esperantisto". Alia ĝojo estas la raporto pri niaj simplaj kaj modestaj prelegoj al kroatoj. Ankaŭ la komuna foto sur la lasta paĝo de la revuo emociigis nin. Vere estis tre belaj momentoj. Neniam ni forgesos vian zorgon kaj atenton pri ni. Ni esperas ke vi vizitu nin por ke ni povu fari la samon. Eble en 2014 ?

Gilberto kaj Cidinjo Menegasso,
(São Carlos Brazilo)

Multan dankon por la du numeroj de "Zagrebaj Esperantisto". Ili bone alvenis, kvankam ili iomete malsekiĝis, kaj paĝoj estas iom kungluitaj. Mi sukcesis malglui ilin, sed tiel difektis la revuojn. Tamen ili estas ankoraŭ bone legeblaj.

Nicole Else (Aŭstralio)

Dankon pro la du numeroj de "Zagreba Esperantisto". Mi legis la artikolon kaj poemon titolitajn "Decembro en funebro". Ambau TRE plaĉis al mi! – Vida donacis al mi en Zagrebo 2001 sian katalogon de Maria Theresia kaj bele dediĉis ĝin al mi, "sia amikino".

Mi trovis alian libreton: "Tragedio en la Universo" de "La Junaj Astronomoj-Esperantistoj", tradukita de Ivo Rotkvić kun la dediĉo: "Al la Ĝenerala Sekretario, Prof. Dr. Ivo Lapenna, kies celkonscia gvidado dispartis novan epokon por la Esperanto-Movado, tutkore Ivo Rotkvić 23.V.1961. – Unu el miaj plej bonaj amikoj, la mondfama dana astronomo Prof. D-ro Erik Høg, ĵus verkis longegan artikolon (32 p. plus 4 p. de fotoj). Ni ofte renkontiĝas, lastfoje antaŭ kvar tagoj en la Universitato de Kopenhago. Tie li donacis al mi kopion de sia artikolo en la angla, ĉar li deziris, ke mi legu ĝin. Tion mi faris nokte kaj trovis ĝin, kompreneble, treege interesa. Temis pri lia restado ĉe la Observatorio en Hamburg, lia gravega laboro tie, kie li vivis dum 15 jaroj. Buŝe mi ofte aŭdis de li "rakontojn" pri la multaj sciencistoj kaj lia vivo tie, sed mi ĝuis legi tiun artikolon. – Strange, ke ĝuste nun, hodiaŭ, mi trovis la jam menciitan libreton pri astronomio, kaj hieraŭ mi ricevis du revuojn de vi, unu dediĉitan al la forpasinta astronomo kun pluraj artikoloj pri astronomio.

Birthe Lapenna
(Kopenhago, Danlando)

Estas tre agrable por mi legi vian revuon. Ĝi tre belaspektas kaj la fotoj estas vere bonkvalitaj. Ne oftas tio! Dankon. Se mi bone komprenas, nur unu numero aperis en 2012, je la fino de la jaro. Ege interesis min la du artikoloj de aŭ pri la juna profesoro Krunoslav Puškar. Mi ne sciis, ke en Zagrebo

okazis kolegio pri Interlingvistiko kaj la strukturo de Esperanto. Kaj la temo de la diplomalboraĵo estas tute aktuala.

Kun plezuro mi malkovris la rubrikon pri la libro de Davor Klobučar. En Francio, de kelkaj jaroj furoras kolekto de titoloj ".... por la nekapabluloj" (Ekz: L'informatique pour les nuls), kiuj utilas al ĉiuj. Eble estas iom la sama intenco: klarigi fakon paŝo post paŝo.

Mirigas min la vorto "konsolidigi"... la esperantistajn fortojn (sur la 3a paĝo). Se estus Franco kiu skribus tion, mi taksus tiun vorton idiotismo, eĉ francismo. Ĝi aperas nek en la PIV, nek en la reta vortaro. Ĉu "plifirmigi" ne pli taŭsus?

Same intrigas min la vorto "lemo" (paĝo 19: "la vortaro enhavas minimume 25000 lemojn"). "Lemo" apartenas al la kampo de matematiko. En la franca, oni parolus pri "entrées" (eniroy = vortoj). Ĉu ne temas tute simple pri "temoj"?

Interesas min scii kiel parolantoj de aliaj lingvoj ol la mia uzas Esperanto-vortojn.

Anne Jausions (Francio)

RESPONDO DE LA REDAKCIO


La vorto "konsolid/o" troviĝas en la "Granda vortaro Esperanta-kroata" de Lucija Borčić (2008) en la senco: *kunigo, ordigo, plifirmigo, plifortigo*. La vorto "lem/o" ne apartenas nur al matematikaj sed ankaŭ al filozofiaj kaj leksikologiaj / leksikografiaj terminoj. En la trie menciita senco ĝi estis uzita en nia artikolo: *vorto en la alfabeto sinsekvo, pritraktata en la vortaro*.

Por krevi!



 Tihomir Lovrić

CERBAJ IMPULSOJ

 Dinko Matković

Kiam oni ofertas al la mortonto daŭran ĉielan vivon, la malsanulo ne akceptas ĝin.

Feliĉo ne troviĝas en mono, sed kiel tion pruvi se vi havas minuson je via bankokonto.

En demokratio ĉiu havas rajton ankaŭ erare pensi.

Oni diras ke demokratio malfermis al ni okulojn, sed ŝajnas ke la plimulto estas miopa.

ALBANAJ PROVERBOJ

 Bardhyl Selimi

La glavo vundas la korpon, la parolo - la animon.

Dolĉa lango malofte estas sen dorno surpinte.

Frue aŭ malfrue la mensogo hontigos la mensogulon.

La mensogo similas al vundo; eĉ kuracita ĝi postlasas signon.

Ĉiu arbo havas sian radikon, ĉiu kverelo havas sian kaŭzon.

Unu minuto da konversacio pli bonas ol unu semajno da milito.